


l'esperanto



la langue de l'amitié  
sans frontières



esperanto



la lingvo de l'amikeco  
sen landlimoj

## ... calculer "à la japonaise" !...

### ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale  
**ESPERANTO**  
regroupant  
les départements  
**Meurthe-et-Moselle (54)**  
**Meuse (55)**  
**Moselle (57)**  
**Bas-Rhin (67)**  
**Haut-Rhin (68)**  
**Vosges (88)**

Maison des Jeunes  
et de la Culture  
« Philippe Desforges »  
27, Rue de la République  
FR-54000 NANCY

#### ABONNEMENT / ABONO

annuel / jara  
14 €  
eksterlando  
18 €



photo Cyril HURSTEL

Certes, une "calculatrice" afficherait instantanément le résultat des opérations ! Pratique sans doute, mais pas très pédagogique ! Alors que la découverte du système de calcul lorsque l'on utilise un boulier, et qui plus est, un boulier japonais ( *le soroban* ), présenté par une souriante dame japonaise qui parle la Langue Internationale ESPERANTO, avec une traduction assurée par le papa d'une camarade de classe, c'est autre chose !...

*Kimie Markarian*, d'origine japonaise, vit aujourd'hui au Royaume-Uni. Elle est membre de la *Japan Society*, fondation britannique consacrée à l'éducation et à l'information interculturelle. Conférencière depuis plus de 10 ans, elle contribue à la création de plusieurs cours de "soroban" dans divers pays.

C'est ainsi qu'elle a initié à ce mode de calcul rapide une classe de CM1 dans une école d'Obernai, suscitant l'intérêt voire l'enthousiasme des élèves, dont la plupart se sont approprié rapidement l'utilisation du boulier traditionnel encore ponctuellement en service au Japon.

Dans ce bulletin, votre fiche d'inscription  
à notre rendez-vous culturel d'automne à RASTATT ( DE )

<b>Espéranto France-Est</b>	<b>esperanto</b> France-Est	<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio.</b>
<b>La Informilo</b>	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>
<b>Rédaction:</b> <b>Redaktoro:</b>	<b>PoI DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC</b>	
	poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libro servo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libro servo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro PoI DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06.98.09.62.81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Assesseeurs	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06 34 33 68 93	mirantur@hotmail.com
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.16.63	bertrand.wick@wanadoo.fr
	S-ro Alian Collignon	03.83.40.35.60	colli.alano54@orange.fr

<b>Abono al La Informilo →</b>	Francio: 14 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← <b>Abonnement à La Informilo</b>
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>	← <b>Paiement par chèque au nom de</b>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>	← <b>Paiement par virement au compte</b>
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

SOMMAIRE N° 150	
1 boulier japonais	17 Marie Marvingt
2 ours	18 cpte-rendu Sarreguemines
3 / 4 éditorial	19 id Skokovy
5 adhésion Rastatt	20 maire Herzberg
6 info Grés. et Kvinpétalo	21 semaine Espagne
7 id Plouézec et Sète	22 Diplômes d'Éo
8 cpte-rendu AG	23 nouveaux sites
9 id stage Villers	24 film Sam Green
10 / 11 id Kaisersl.	25 / 26 libro-servo
12 Interkant'	27 Rubik-cube
13 activ. Mulhouse	28 / 29 botaniste japonais
14 cpte-rendu Nilvange	30 anecdotes
15 id Koménius	31 énigmes
16 mai Europe – Nancy	32 photothèque

<b>ISSN 0291 6037 trimestriel</b> bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle <b>Esperanto France-Est</b> MJC PhiJippe Desforges – 27 rue de la République <b>54000 NANCY</b> Directeur de la publication : <b>Edmond LUDWIG</b> Rédacteur : <b>PoI DENIS</b> Dépôt légal : <b>30 juin 2010</b> Imprimé par l'Office Central de Coopération à l'Ecole Place de l'Ecole Normale, 55000 BAR-le-DUC N° CPPAP : <b>0409 G 83517</b>
---

# Angulego de la prezidanto

## Semajnfinaj staĝoj : ĉu ankoraŭ aktualaj ?

### IOM DA HISTORIO !



Kiam Sinjoro COLNOT kreis en Nancy la perkorespondan kurson ( PKK ) de la tiam *Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto*, la bezono de tiam tiel nomataj PAROLATAJ STAĜOJ DE ESPERANTO estis grava : la kursanoj ne havis multe da okazoj por aŭdi la lingvon, kiun ili lernis, ĉar nur malmultaj metodoj proponis diskojn kaj poste kasedojn por la lernado de la lingvo. Certe eblis strikte apliki la prononc-regulojn de Esperanto, sed ne ĉiuj tion faris kaj neniu korektis ilian prononcon. Ni krome ne forgesu, ke komence de la sepdekaj jaroj longaj telefonalkvokoj ankoraŭ multekostis, kaj ne tiom da homoj posedis telefonon ! Krome la emisiado de Esperanto-elsendoj per mallongaj ondoj ofte ne ebligis tre kvalitan aŭskultadon.

#### Renkontiĝo de la gelernantoj de PKK kun spertaj parolantoj de la lingvo do ege utilis.

Jam tiam nia regiona asocio havis sian sidejon en MJC Philippe DESFORGES, kiu cetere disponis pri vasta ĉambraro por gastigo de plej diversaj staĝanoj. En 1974 Sinjoro COLNOT ekorganizis semajnfinajn staĝojn diversnivelaĵajn laŭ la sistemo, kiun ni ankoraŭ proponas nuntempe. Tiam la kursoj funkciis kun la sekvaj niveloj :

- A1 por komencantoj, kiuj malkovras la lingvon,
- A2 por gelernantoj, kiuj lernis proksimume duonon de elementa kurso ( perkoresponde aŭ en sia loka grupo ),
- B por tiuj, kiuj finlernis elementan kurson kaj kiuj deziris trejni sin al parola uzo de la lingvo,
- C por finlernintoj de supera kurso, kiuj uzis tekstojn el la esperanto-literaturo por fajnigi sian konon de la lingvo, kaj fine ...
- D por la spertaj parolantoj de la lingvo, al kiu la organizantoj invitis preleganton kaj/aŭ gvidanton de seminario pri difinita temo.

La staĝoj okazis printempe kaj aŭtune, kaj ni ne forgesu aldoni, ke kelkafoje eĉ **pli ol 90 personoj** partoprenis tiujn staĝojn, kiuj plej ofte estis internaciaj, kaj pro la origino de la staĝanoj, kaj pro la origino de la prelegantoj aŭ kursgvidantoj !!! La sabatan vesperon ĉiam agrabligis esperantlingvaj artistoj plej diversaj.

... ..

Sed venis alia epoko : en 1983 *la ĉambraro de la MJC ne plu estis uzebla* . Necesis do trovi alian staĝejon, ekzemple la tiaman *Maison de l'Asnée en Villers-les-Nancy*, kie la Nancy-a grupo ilin pluorganizis, ankaŭ post la forpaso de Sinjoro COLNOT.

Dume sin proponis membroj de aliaj regionoj por organizi staĝojn laŭ la sama modelo : **En Loreno** ( *Moulins-les Metz, La Vigie, Thionville* ) kaj **en Elzaso** ( *Betschdorf, Haguenau, Strasburgo, Soultzbach-les-Bains, Sondernach-Landersen* ) . Tiuj alilokitaj staĝoj ja ankaŭ havis la celon krei Esperanto-eventojn en plej diversaj lokoj kaj doni la okazon al aliaj esperantistoj, ĉeesti renkontiĝon ne tro for de sia loĝloko.

Fine aperis nova kutimo : la organizado de nura printempa staĝo en nia orientfranca asocio, kaj partopreno en aŭtuna staĝo en Germanio, kio ja estas bona ebleco praktiki Esperanton sen la tento je krokodilado...

### Nuntempa konstato :

De pluraj jaroj nun ni konstatas la jenon :

- Post artikolo priesperanta en la regionaj gazetoj ( kiuj cetere pli kaj pli perdas siajn legantojn ) alvenas tre malmultaj petoj de informoj, kiam la strat-adreso aŭ la ret-adreso de la PKK estas indikita ( la ĉi-jarajn gelernantojn de PKK ni akiris pro reklamado en budoj ),
- En la mezlernejoj kaj liceoj de nia regiono, kvazaŭ ne plu funkcias Esperanto-kursoj,
- Ŝajnas, ke la ek-lernantoj sin direktas al la senpagaj kursoj *sur-retaj* aŭ lernas *en la grupoj*.
- La nombro de la kursanoj en niaj staĝoj malkreskas.
- La plej granda parto de la staĝanoj ĉeestas la prelegon aŭ la seminarion de elstara gasto.
- La daŭro de la staĝo plilongiĝis ( ekde vendredo al dimanĉo ) kaj la turisma parto pli kaj pli gravas.
- La restantaj instruantoj, kiuj instruas al malmultaj gelernantoj, konstatas, ke tiuj ja plene profitas la eblecon praktiki la lingvon, sed post du duontagoj ili estas elĉerpitaj ! Do, despli post tri duontagoj !
- Aŭdiĝas de tempo al tempo, ke la staĝoj iĝas kostaj por pli kaj pli da homoj.

**Novaj proponoj :**

Estas fakto, ke trejnado al parola uzo de la lingvo estas necesega. Sed ĉu ne estus imagebla la jena propono, kiu jam funkcias diversloke :

- iu grupo proponu unutagan ( aŭ duon-tagan ) instruadon diversnivelelan por komencantoj, kaj por gelernantoj, kiuj jam de kelka tempo lernas. Do, du niveloj, en kiuj partoprenu gelernantoj de la organizanta grupo kaj homoj, kiuj lernis perkoresponde aŭ kiuj lernis en alia grupo. Ekzemple iun sabaton, de la 10-a ĝis la 12-a kaj de la 14-a ĝis la 18-a, aŭ dum post-tagmezo.

- **Por spertaj esperantistoj**, kiuj ĉefe deziras ĝui la lingvon, iu grupo aŭ unuopulo organizu ekzemple unutagan seminarion kun fama aŭtoro, aŭ prelegon kun postaj diskutoj de esperantista fakulo, aŭ organizu koncerton de artisto, eĉ prefere por neesperantista publiko, sed en kiu ankaŭ partoprenos la esperantistoj.

Estus imagebla posta aŭ antaŭa komuna manĝo por ĝui nian esperantofamilian etoson ! Por samideanoj, kiuj dezirus tranokti ĉi-okaze, sufiĉus konsili apudajn hotelojn.

Kompreneble ĉiujn tiujn eventojn ni anoncus per la gazetaro, kio ebligus despli oftan reklamon.

Se vi konsentas pri tiuj analizoj, kaj deziras agadi ĉi-metode, antaŭdankon pro viaj iniciatoj.

*Edmond Ludwig*



Ni rememorigas al vi la retejon de nia asocio **Esperanto France-Est**

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

Krome eblas ankaŭ atingi ĝin per

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Vi estos informitaj ne nur pri la vivo de nia asocio sed ankaŭ pri aktivajoj de la lokaj grupoj, de unuopuloj ... kaj pri Esperanto ĝenerale !

Multaj ligoj ebligos al vi trovi aliajn interesajn retejojn en Francio kaj en la mondo  
La nova rubriko **“nos albums photos”** revivigas okultrafe regionajn eventojn... kaj alilokajn !  
indas ofta vizito !

pour vous initier à la seule  
vraie langue  
internationale,  
pour vous perfectionner  
ou éprouver le plaisir rare de converser  
en espéranto...



➔ nos stages, nos congrès,  
nos rencontres, nos voyages...



apprendre  
l'espéranto

rapidité ...  
efficacité ...

- ☆ un matériel adapté
- ☆ une technique éprouvée
- ☆ un réseau d'animateurs compétents
- ☆ un savoir immédiatement opérationnel

"☆☆☆ ?...  
-☆☆☆☆ !"



deux maîtres- mots  
de notre cours  
par correspondance !...

chez soi !

Edmond LUDWIG  
26, route de la Schlucht  
68140 STOSSWIHR  
03 89 77 52 55

*une diffusion  
sur toute la région  
...et au-delà !*



**32a BAVELO-Seminario**

**Diözesanbildungshaus  
St. Bernhard**

**An der Ludwigsfeste 50,  
DE-76437 Rastatt**

Tel. 00.49/7222/21194, Fakso 00.49/7222/17430

**68a regiona  
staĝo de**

**esperanto**  
*France-Est*

Okazos en Rastatt en Germanio  
de 17a ĝis 19a de Septembro 2010

BAVELO ankaŭ ĉi-jare proponas kursojn kun entuziasmigaj instruistoj por komencantoj (A1, A2) kaj progresintoj (Paroliga). Kaj por „spertaj Esperantistoj“ okazos enkonduko en la multajn uzeblecojn de *Vikipedio*, kaj invito al redakta kunlaboro en la teamo de ĝiaj honoroficiaj redaktantoj. Konatiĝu kun *Vikipedio*, kiel leksikono, kiel helpilo por tradukoj, kiel kolekto de fak-tekstoj por ampleksigi kaj profundigi vian vorttrezoron, kaj ekspertu plie pri la fascina kreiva mondo de propra kunlaboro en ĉi-tiu internacia enciklopedio.



La ekskursoj montras la plej belajn kaj interesajn flankojn de la barok-urbo Rastatt kun la palaco kaj la kazematoj, kiuj ludis gravan rolon en la Badena Revolucio de 1849 kaj nur antaŭ mallonge estis denove faritaj alireblaj helpe de hobiaj historiistoj.

Kursoj kaj prelegoj:

- A1** - komencantoj sen antaŭscioj (Johannes Mueller)  
**A2** - komencantoj kun antaŭscioj (Ginette Martin)  
**P** - Paroliga kurso (Edmilson Lima Serejo)  
**V** - Vikipedio (Alois Eder, Ursula Niesert)

**Aliĝilon** bonvolu sendi al:  
S-ino Inge SIMON,  
Brünner Str. 20  
DE-73431AALEN  
Tel. 00.49-7361/ 360 615,  
Inge.Simon@esperanto.de

**Programo****Vendredo, 17a septembro 2010**

Alveno ĝis 18:00, vespermanĝo, kursoj, muziko kun Johannes Mueller

**Sabato, 18a septembro 2010**

Matene, malfrue posttagmeze kaj vespere: kursoj. Posttagmanĝo: gvidata urbo-promenado. Vespere dancado.

**Dimanĉo, 19a septembro 2010**

Matene kursoj aŭ vizito al la kazematoj. Tagmanĝo, poste adiaŭo.

**Kostoj:**

**Kotizo:** 30 € (rabato por junuloj: 15 €)

**2 tranoktadoj kaj 6 manĝoj:**

120,- € unulita, 100,- € dulita ĉ. (duŝo/neces.)  
75,- € plurlita ĉambro (duŝo koridora)

**Oferto por familioj**

200,- € por gepatroj kaj infanoj

La aliĝo validas post alveno de mono:

Pagebla per ĝiro al  
CCP Esperanto France-Est  
1997 72 W Nancy  
per franca ĉeko al  
Esperanto France-Est  
sendata al  
André GROSSMANN  
5, rue des Pyrénées  
68390 BALDERSHEIM  
ret-adreso: andreo.ag08@free.fr

**Aliĝilo al 68a staĝo de Esperanto France-Est**

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo
1		
2		
3		
4		
Adreso		
Telefona:		
Ret-adreso:		
Mi pagas la sumon..... al Esperanto France-Est		

**Mi / ni partoprenos la kurson:**


A1  A2  Paroliga  Vikipedia kurso

**Ĉambroj / manĝoj:**

- unulita ĉambro  
 dulita ĉambro kune kun \_\_\_\_\_  
 plurlita ĉambro  
 junulo  
 familio: ( \_\_\_ plenkreskuloj + \_\_\_ infanoj)  
 mi volas vegetaran manĝon.  jes  ne  
 mi havas alergion kontraŭ \_\_\_\_\_  
 sen manĝoj (kostoj reduktiĝas je 34 €)  
 mi mendas unuopajn manĝojn:

**ve 17 sa 18 di 19**

<b>matenmanĝo</b>	8,-	-	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
<b>tagmanĝo</b>	10,-	-	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
<b>kafo/kuko</b>	5,-	-	<input type="checkbox"/>	-
<b>vespermanĝo</b>	10,-		<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>



## ... frandi multifacetan esperanto-etoson somere en Francio ...

Eble vi ne konas *Kvinpetalon*? Gi estas kulturcentro en la vilaĝo *Bouresse*, en sudokcidenta Francio, je 40 km de *Poitiers*. Bela regiono, kun multaj turismaĵoj.

*Kvinpetalo* estas en agrabla kaj trankvila kamparo. La ĝardeno beligiĝis dank'al la laboro de la partoprenintoj de la printempa staĝo. Kaj jen diversaj proponoj, por samtempe feriumi kaj instruiĝi.

*Kvinpetalo* atendas vin kaj viajn amikojn.

Bonvenon!

Julio 19a-24a	<b>Esperanto kaj Turismo</b>	Catherine Kremer
Julio 30a- Aŭgusto 6a	<b>Tradukado ( 2a grada nivelo )</b>	Claude Gerlat
Aŭgusto 10a-17a	<b>Muzika Staĝo [ 3 ]</b>	Markov-familianoj
Aŭgusto 13a	<b><u>Escepta koncerto de <i>Kajto</i></u></b> je la 21a	<i>Kajto</i>
Oktobro 10a-16a	<b>Malkovri la Esperantan literaturon</b>	Anne Jausions


N.B. La datoj de la staĝoj indikas la unuan kaj la lastan tagojn. Oni prefere alvenu la antaŭan tagon. ( Notu, ke la vespermanĝoj kutime okazas je la 19-a kaj duono). Fine de staĝo preparanta ekzamenon, plejofte eblas trapasi ĝin.

Plej malfrua kandidatigo : komence de la staĝo.

Nia ret-adreso : [informoj @ kvinpetalo.org](mailto:informoj@kvinpetalo.org)

[ 3 ] Dum tiu ĉi staĝo, esperanto estos praktikata pere de muziko : libera aŭ plurvoĉa kantado, orkestra muziko, kaj diskutoj pri la kreokunteksto de la prilaborataj verkoj, paralele kun unuagrada kurso por komencantoj. La staĝo finiĝos per koncerto, por kiu memordisko ( KD ) estos produktita. Dum la staĝo okazos ankaŭ escepta koncerto de *Kajto*, la 13an de aŭgusto, por festi la 25an jubileon de SYM ( *Société Yvonne Martinot* ) asocio mastrumanta *Kvinpetalon*.

... sed ankaŭ vizitinda unu el la plej gravaj esperanto-kulturcentroj de Eŭropo ! ...  
25 volontuloj el pluraj landoj zorgos pri vere interesa programo kaj agrabla restado,  
inter la 17<sup>a</sup> de julio kaj la 14<sup>a</sup> de aŭgusto



## programo somero 2010 17 julio – 14 aŭgusto

17 – 24 julio	<b>Daniel Biro-Walker</b> <b>Jean-Luc Kristos</b> <b>Tomasz Chmielik</b> <b>Patrick Lagrange</b> <b>Jean-Luc Kristos</b>	<i>vizito en Esperantio</i> <i>parola komunikado en luda etoso</i> <i>tradukado-ateliero pri verkoj de Privat</i>  <i>astronomio, observi la noktan ĉielon...</i> <i>kantoj kaj dancoj</i>
24 – 31 julio	<b>Christophe Chazarein</b> <b>Jean-Luc Kristos</b> <b>Aurora Bute</b>  <b>Tomasz Chmielik</b> <b>Jean-Luc Kristos</b>	<i>komenc-kurso per rekta kaj luda metodo</i> <i>parola komunikado en luda etoso</i> <i>tekst-studado, gramatiko, konversacio</i>  <i>tradukado-ateliero pri verkoj de Privat</i> <i>kantoj kaj dancoj</i>
31 julio – 7 aŭgusto	<b>Thierry Saladin</b> <b>George Handzlik</b> <b>Tomasz Chmielik</b>  <b>Nina Korjenevskaja</b> <b>Caroline Mauboussin</b> <b>Eida Messias Lima</b>	<i>la bazoj de Esperanto per la Cseh metodo</i> <i>praktiki konversacion, kanti...</i> <i>tradukado-ateliero pri verkoj de Privat</i>  <i>teatro: preparado de spektaklo por vendredo</i> <i>bindado: bindi sian propran libron</i> <i>brazilaj dancoj: samba, forró</i>
7 – 14 aŭgusto	<b>Evgeni Georgiev</b> <b>Nina Korjenevskaja</b> <b>François Lo Jacomo</b>  <b>François Lo Jacomo</b>	<i>komenc-kurso per la Cseh metodo</i> <i>plibonigi sian praktikadon de Esperanto</i> <i>provi la Esperanto-ekzamenojn</i>  <i>ludo pri lingva diverseco « Dollmätisch »</i>
30 julio 5 kaj 8 aŭgusto		<i>3 teatraj prezentoj : Ludoviko Lazaro, de George Handzlik</i>

informoj, aliĝoj:

+33 (0)9 51 64 10 34

[www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)

[www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)

M.C.E., kastelo Grésillon, 49150 BAUGÉ, Francujo

# 14èmes rencontres internationales d'Espéranto



**Du 14 au 21 août 2010 à PLOUEZEC  
( Bretagne )**

- [Accueil](#)
- [Enseignants](#)
- [Invités d'Honneur](#)
- [Programme](#)
- [Logement](#)
- [Inscriptions](#)
- [Pluezek Esperanto](#)
- [Photos - Livre d'or](#)
- [Dans la Presse...](#)

Chaque année,  
des intervenants &  
des enseignants hors  
pair pour plus de  
150 participants,  
dans une  
atmosphère amicale  
et une région  
touristique...



Geedzoi Grattapaalia

<http://www.Pluezec-esperanto.net> - [pluezec@gmail.com](mailto:pluezec@gmail.com)

## **36a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO 36ème SEMAINE INTERNATIONALE D'ESPÉRANTO**

2010-08-21 - 2010-08-28

du 21 au 28 08 2010

"Le Lazaret" SÈTE ( Sud-Francio )

programo - informoj

<http://perso.orange.fr/nikolao/esperanto.html>



tagmanĝo en la feriejo

## **Jara Membro-kunveno de la Federacio Esperanto France-Est**

**Dimanĉon, la 18 an de aprilo 2010**

**7 rue des glaciers 67000 STRASBURGO**

(Kutima kunvenejo de la strasburga grupo)

**Ĉeestas 14 partoprenantoj** : Mireille ANTONI-TURCK, Alain COLLIGNON, Pol DENIS, Bruno FLOCHON, André GROSSMANN, Jacques HERLÉ, Cyrille HURSTEL, Robert KUENY, Simone KIRY, Edmond LUDWIG, Frédéric PORRETTI, Bernard REIFFSTECK, Jean-Luc THIBIAS, Bertrand WICK. Alvenis ankaŭ 25 voĉdon-raĵtigiloj.

### **Agad- kaj financ-raportoj**

La kunveno estas malfermita de la prezidanto Edmond LUDWIG je la 10a. Li salutas la asembleon, dankas la strasburgan grupon por la disponigo de la salono kaj prezentas la agadraporton.

Koncerne la buĝeton de 2009, la Federacio deficitas je 200 eŭroj, " La Informilo " deficitas je 316 eŭroj

La kasisto prezentis ankaŭ la prognoz-buĝeton por 2010.

Jean-Luc THIBIAS prezentis la financon raporton de la "Libro-servo" : malprofito je 1700 eŭroj

Ambaŭ raportoj estas unuanime adoptitaj.

La du financaj raportoj estas unuanime adoptitaj.

### **Projektoj por 2010**

- " Esperanto-Semajno " en Strasburgo de la 19a ĝis la 24a de aprilo : Bruno FLOCHON kaj Cyrille HURSTEL prezentas la ĉefajn agaderojn de tiu semajno.
- Partopreno de " Esperanto 54 " al la Eŭropo-Semajno, de la 3a ĝis 5a de majo en Nancio.
- Staĝo de Esperanto en Strasburgo la 8an de majo.
- Libro foiro de Fontenoy-la-Joute : informbudo pri Esperanto : unuafoje verŝajne dum la " Eŭropa Foiro de la libroj " la 15an de aŭgusto.
- Aŭtuna " Semajnfina renkontiĝo " kun BAVELO (Germanio) la 17-19ajn de septembro.
- Printempa " Semajnfina renkontiĝo " 2011 en la Vogezoj.

### **Reelekto de la komitato ;**

Kvar komitatanoj estas reelekteblaj : Pol DENIS, Gilbert STAMMBACH, Simone KIRY, Jean-Luc THIBIAS. Ne plu sin prezentas : Gilbert STAMMBACH.

Estas proponitaj ĝis 2012 : Alain COLLIGNON kaj Bertrand WICK.

Per manlevo ĉiuj kvin kandidatoj estas elektitaj.

### **Ŝanĝiĝo en la nova komitato.**

Post alvoko al la novaj postenoj, la ĉi-suba estraro estas unuanime adoptita :

Prezidanto : Edmond LUDWIG (samtempe responsulo de la PPK).

Sekretario : Robert KUENY

Vic-sekretario : Jacques HERLÉ (samtempe prizorganto de " prezento-budoj ")

Kasisto : André GROSSMANN

Redaktoro de La Informilo : Pol DENIS

Responsulo de la Libro-servo : Jean-Luc THIBIAS

Federacia delegito ĉe Esperanto-France : Cyrille HURSTEL

Asesoroj : Mireille ANTONI-TURCK, Liliane BERSWEILLER, Alain COLLIGNON, Roger DEGRELLE, Simone KIRY, Ginette MARTIN, Frédéric PORRETTI, Bertrand WICK.

**La kunveno fermiĝis je la 17a.**



Villers-lès-Nancy - 5 / 9<sup>ajn</sup> de marto 2010

laŭ raporto de Gisèle Bertapelle  
photos André Grossmann



Gastigis kvardekon da enpartoprenantoj la "Maison de l'Asnée", en kiu jam okazis plurfoje la sama evento.

Vera internacieco, pro la ĉeesto de Germanoj, Belgoj, Nederlandanoj, Luksemburganoj, Portugalanoj, al kiuj aldoniĝis impona grupo de orienta Francio.

Spite al neĝo, scivolemuloj deziris malkovri la urbon, jam vendrede nokte, antaŭ ol ĝui la tradician -ĝojigan !- babiladon ...

Tiun malkovron re-okazis la morgaŭon, sub siberia temperaturo, malgraŭ disradianta suno. Interalie, okultrafa vizito de la "Musée des Beaux-Arts".

### Kultura sekvenco sabate ...

Inter la kurso-gvidantoj: Robert Kueny, Gérard Greiner, André Grossmann,

Edmond Ludwig kaj Ginette Martin.

Nia invitita preleganto, Edward Borsboom, rivelis la manieron aŭtentigi la verajn pentraĵojn de Rembrandt, inter la "ege multnombraj" atribuitaj al la artisto. Duan temon pritraktis Edward "Ni sciu plu pri la "rekta" instru-metodo "rekta "de Cseh".

Dum la tuta semajnfino disponiĝis ampleksa kolekto da verkoj, dank'al la skipo de la "libro-servo". Ĝiaj vizitantoj kaptis la okazon por ankaŭ frandi kafon kaj kukon.



### Distra vespero ...

Ĉiam atendita, ĉiam aplaŭdinda -kaj ...-ita!- *JoMo* spektaklis dum du horojn, daŭre vigle kaj nelaciĝe. Lia moviĝema gitaro akompanis kanzonojn en diversaj lingvoj, kaj la publiko entuziasme ĝuis la "sonoran" repertuaron de multfaceta animanto !

Disiĝo, je la staĝa fino, kun promeso de sama amika rendevuo en Rastatt en aŭtuno.



# Kaiserslautern 2010

## Komuna Franca kaj Germana Esperanto-Kongreso

Tre sukcese okazis de la 21a ĝis la 26a de majo tiu du-landa kongreso en Kaiserslautern. Plej ofte la franca kaj la germana landaj asocioj havis apartajn labor-programojn, sed iuj prelegoj, kaj ĉefe ekskursoj kaj distraj vesperoj estis kumunaj.




Kapriol el Frislando malfermis vendrede vespere la kongreson per muzika programo. En la sabata vespero ili ne nur muzikis sed ankaŭ dancigis la partoprenantojn, kiuj volonte akceptis lerni novajn danc-paŝojn. El tio ekestis tre agrablaj kaj gaja etoso.




En la publiko anoj de nia federacio

Aparte impona estis la koruso, kiun iniciatis kaj gvidis Franjo Lévêque el Bretonio. Ŝi sukcesis arigi plurajn kantemulojn el Francio al kiuj aldoniĝis kelkaj el Germanio. En la programo: Interkant': "Kanto Ĝenerala" de Mikis Theodorakis laŭ tekstoj de Pablo Neruda. La tuta prezentado estis grandioza kun tre talentaj sopranino kaj baritono. Tion konfirmis la varmaj aplaŭdoj de entuziasma publiko.



Ankaŭ okazis labor-programoj de la landaj asocioj. Jen la komitato de Esperanto-France kunvenas por elekti sian estraron. Okazis tre malfacilaj decidoj. Finfine elektiĝis kiel prezidanto Xavier Devidehem, kiel kasisto Sébatien Montagne, kiel sekretario Raymonde Coquisart, por eksteraj rilatoj Cyrille Hurstel, por kulturo Claude Nourmond



Dimanĉe posttagmeze okazis busa ekskurso al la burĝo Lichtenberg en la subdistrikto Kusel. En ĝi troviĝis interesa muzeo de la Muzikisto-lando. La ekskurson lerte gvidis Brian Moon. La dua muzeo rilatis al mineraloj de la permio-erao, antaŭ 290 milionoj da jaroj.




La kongreso estis solene fermita la 24an de majo. Tiam en la posttagmeze estis proponita vizito al impona japana ĝardeno kun interesaj klarigoj de Wolfgang Bohr.



En la japana ĝardeno kaj poste.

La tuttaga ekskurso ebligis viziti la urbon Idar-Oberstein en la valo de la rivero Nahe. La ĉefa vidindaĵo de la urbo estas la Felsenkirche (Roka Preĝejo), kiun oni konstruis en 1482 sur la fundamentoj de kaverna kastelo. De tie eblis ĝui panoramon al la urbo kaj al la valo. Iuj kuragis pli supren-grimpi al la ruino de kastelo Oberstein.



La valo ankaŭ famas pro valor-ŝtonaj minejoj. Tial nia ekskurso finiĝis per vizito al Germana Valor-ŝtona Muzeo de la historia gemo-ŝlifejo, kie eblis admiri mirindaĵojn de naturo kaj homa interveno.

Post grimpado kaj malgrimado ni atingis la restoracion. Tie Franjo sciigis al ĉiuj, ke en tiu tago Gaby (Gabrielle) atingis sian 90-jariĝon kaj transdonis al ŝi flor-bukedon.



Fotoj kaj tekstoj de Andreo

... en la kadro de la dulanda -franca kaj germana- Esperanto-Kongreso ...

## emociis nin la koruso Interkant'

(jen parto de la koncerto, kies tradukon ni ŝuldas al nia samideano kaj kontribuanto Bernard BEHRA )

“*Voj a vivir ...*” Pablo Neruda – melodio de Mikis Theodorakis  
Je vais vivre (1949) - ”**Ja vivos mi**”

“Yo no voy a morirme. Salgo ahora en este día lleno de volcanes  
*Je ne vais pas mourir. Je pars en ce jour rempli de volcans*  
**Mi ne paŝas al morto. Iradas mi nun en tiu tago plena da vulkanoj**  
hacia la multitud, hacia la vida.  
*vers l'homme en foule, vers la vie.*  
**cele al la homaro, cele al la vivo.**



Aquí deĵo arĝladas estas cosas hoy que los pistoleros se pas ean con la " cultura occidental " en brazos,  
con las manos que matan en España

*J'ai tout réglé. Je laisse tout ceci en ordre, aujourd'hui que les gangsters se promènent avec dans les bras  
la "culture occidentale ", avec des mains qui assassinent en Espagne*

**Mi ĉiun aranĝis kaj ordigis dum la armitaj homoj vagadas kun la “okcidenta kulturo” en brakoj,  
kun la manoj, kiuj murdas en Hispanio**

y las horcas que oscilan en Atenas y la deshonra que gobierna a Chile  
*et des gibets qui se balancent sur Athènes et le déshonneur qui gouverne le Chili.*  
**kaj pendejoj, kiuj luliĝas en Ateno kaj malhonoro, kiu regas en Ĉilio,**

Y paro de contar.  
*Je cesse de conter.*  
**Mi ĉesas rakonti.**



Aquí me quedo con palabras y pueblos y caminos que me esperan de nuevo,  
*Me voici avec des mots, des peuples, des chemins qui à nouveau m'attendent,*  
**Jen mi alvenas kun paroloj kaj popoloj kaj pasejoj, kiuj min esperas denove,**  
y que golpean con manos consteladas en mi puerta.  
*et dont les mains constellées frappent à ma porte*  
**kaj kiuj frapas kun manoj steloplenaj al mia pordo”.**

Traduko en franca de Claude Couffon.

[http://www.villains-massy.org/canto/p\\_avivir.html#toppage#toppage](http://www.villains-massy.org/canto/p_avivir.html#toppage#toppage)



baritono  
**FaMo**




deklamanto  
**Jean-Pierre Ducloyer**



mezosoprano  
**Zdravta Lenepveu**

# MULHOUSE ESPERANTO kaj ties aktivecoj



**Festo de la lingvoj en la Universitato de Mulhouse (Haute-Alsace) la 13an de marto 2010.**

**"Fête des Langues" à la FLSH 13 mars 2010**  
(Faculté des Lettres, Langues et Sciences Humaines) de l'UHA (Université de Haute-Alsace)  
<http://www.flsh.uha.fr>



**Langues diplômantes:**  
allemand, anglais et italien  
+ français langue étrangère (FLE),  
espagnol, japonais, russe, arabe, yiddish,  
chinois, alsacien, langue des signes  
française, latin, grec ancien et  
depuis 2009 l'espéranto.

Ĉi-jare la berbera lingvo estis la lingvo elstarigita, sed kompreneble ankaŭ ESPERANTO estis prezentita ĉe budo kunprizorgita de anoj de Mulhouse-Espéranto (Roberto KUENY, Simone KIRY kaj André GROSSMANN) kaj Bertrand WICK el Village-Neuf. Belan reklambildkarton subtenantan kaj Esperanton kaj la aliajn lingvojn instruatajn en la fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Homaj Sciencoj financis Michel BASSO, la prezidanto de TAKE-ESPERANTO. Ĉiuj vizitantoj ankaŭ ricevis la kalendaron de JeunEspéranto. Ne mankis la vizitantoj.

Edmond Ludwig

## Esperantistinoj el hungara liceo en Mulhouse

La triopo kun sia instruistino pri la franca lingvo kaj Esperanto, sinjorino Martá KOVÁCS, ne venis pro Esperanto, sed por partopreni en renkontiĝo de la ĝemelitaj liceoj Gimnázium Berzsényi Dániel en Budapeŝto kaj la liceo Louis-Armand en Mulhouse. Ili trejniis sin en la franca lingvo kaj ankaŭ partoprenis la gejunulan aranĝon EUROSCOLA en Strasburgo. Sed vojaĝantaj Esperantistoj ja neniam forgesas kontakti lokajn samideanojn.

Kaj jen : la 17-an de marto 2010 la grupo de Mulhouse plej kompleta akceptis la 4 gastinojn ĉirkaŭ tablo kovrita de lokaj kukoj, kuketoj, fruktosukoj kaj elzasaj vinoj. Tre agrabla estis la babilado kun



la ĉarmaj vizitantinoj. Partoprenis ankaŭ la Esperantokursanoj de Bertrand WICK el Village-neuf. Unu el ili, Anne VERNET, ĵus revenintis el Tajvano, kie ŝi perfektigis en la ĉina lingvo kaj kie ŝi kompreneble ankaŭ renkontis Esperantistojn.

Edmond Ludwig





La *Compagnie des Regains* et la *Compagnie Artotusi* présenteront le samedi 8 mai au château, le spectacle *Stono*. Une soirée tout public.

Musique, danse, poésie **en espéranto**, vidéo, pyrotechnie, arts plastiques et théâtre d'ombres : un spectacle d'arts croisés aura lieu au château de Kaysersberg ce samedi 8 mai.

*Stono* (Ŝtono, "pierre" en espéranto) est une création originale de la *Compagnie des Regains* et de la *Compagnie Artotusi*.

Une vingtaine d'artistes professionnels donne rendez-vous au public au château de Kaysersberg

pour évoquer la destinée d'une pierre : son passage de l'état brut à l'objet culturel, sa rencontre avec l'humain et son éveil par l'art. La conception de ce spectacle est signée *Jim Petit* et *Sébastien Benoit*.

La *Compagnie des Regains* qui propose des spectacles vivants en milieu rural est basée à *Orbey*, et la *Compagnie Artotusi* (Arto-tuŝo, "Art du toucher" en espéranto) qui monte des rencontres et crée des spectacles pluri-disciplinaires, a son siège à *Logelbach* où elle est gérée par *Jim Petit*. Composée de professionnels, elle s'engage dans la diffusion d'un éveil artistique et d'un réseau de compétences dédié à l'innovation artistique et au partage.

Y aller : Rendez-vous samedi 8 mai à 20 h, place de la Mairie à *Kaysersberg* pour une ascension en musique jusqu'au château où aura lieu le spectacle.

## staĝo de Esperanto ankaŭ en Nilvange ( Moselle )



kastelo de Lagrange en *Manom*, vespere prilumita de kandeloj.

Vespere, malfermita prelego al la publiko sub la temo "Kiu lingvo por la estonta Eŭropo ?" fare de la lingvisto *André Cherpillod*. *Daniel Cano* prezentis filmon pri "egala komerco kaj solidareca turismo" en *Ekvatorio*, *Thomas Cordonnier*, informatikisto, prezentis al ni la avantaĝojn de la "liberaj programaroj", *Marie-José Behm* kaj *Bernard Vivier* malkovrigis al la staĝanoj propran filmon pri la *Universala Kongreso de Bialistoko* en 2009.

Ĉiuj partoprenantoj ĝuis bonan etoson. Ni gastis malmultekoste en la bela kastelo de *Nilvange*, en tre agrabla parko. Ni menciui la bonkvalitan kaj bongustan nutraĵon, aprezita de ĉiuj.

Unuanime, la partoprenantoj rendevuis por la venonta jaro... Ni ja kuraĝas starigi trian novan staĝon en aprilo. Antaŭvidiĝas kurso gvidota de *André Cherpillod*, kaj koncerto de la nederlanda esperanta folk-grupo *Kapriol*.

Venu en nia verda valo *Fensch*, vi ne bedaŭros !

La staĝo de Esperanto proponita en la *socia kulturcentro Albert Camus* de *Nilvange*, okazis de la 12a ĝis la 16a de aprilo.

Organizis ĝin *Franca Fervojistia Esperanto-Asocio* kaj *Esperanto-Thionville*. Tiuj du asocioj kunigis pli ol dek partoprenantoj: fervojistoj el *Tuluzo*, Belgio kaj el *Thionville*, kaj kelkaj personoj de nia regiono.

La evento tre plaĉis al la partoprenantoj pro la diverseco kaj riĉeco de la programo. La komencantoj malkovris la internacian lingvon kaj lernis ĝiajn bazojn. La plej spertaj ellernis kelkajn tiklajn gramatikajn punktojn kun *André Cherpillod* kaj praktikis la lingvon kun *Catherine Kremer* kaj *Bernard Vivier*.

Pri la turisma programo ni proponis gvidatajn vizitojn: alt-fornego de *Uckange*, vizito de *Nancy*, muzeo de la motorcikloj kaj bicikloj en *Amnéville*, la

## Infanrenkonto kadre de la "projekto Komenius"

Pollando - Bulgario - Hungario - Francio



amikumu

Laŭ la ciklo dum du jaroj, kvar lernejoj renkontiĝis de la 2-a ĝis 8-a de majo 2010 en la *Mezlernejo (1) Pierre Valdo* en VAULX-en-VELIN ( Francio ), urbeto je 5 km oriente al *Lyon-Liono*.



Post la unua renkonto en oktobro 2009 en Bulgario, temas pri la dua laborrenkontiĝo kadre de la projekto "*Gvidlibro de la amikeco*", financata de la programo "*Comenius*". Gelernantoj kaj geinstruistoj el Bulgario, Hungario,

Pollando kaj Francio partoprenis laŭ la temo: "*Eŭropo – pasinteco, estanteco kaj estonteco*". La preparado por la renkontiĝo inkluzivis ellaboradon de paneloj kun la mapo de la *Eŭropa Unio*, preparado de multmediaj prezentadoj laŭ la temo "*Historia disvolviĝo de la partneraj landoj dum la periodo inter la jaroj 1200 kaj 1299*", preparado de informtabuloj por la apero kaj la evoluo de la EU.

Ekde la unua labortago, lunde, la partoprenantoj estis dividitaj en grupoj miksitaj, inkluzivante reprezentantojn el ĉiuj landoj. **Neniu havis eblecon paroli sian gepatran lingvon.** Ni devis uzi niajn sciojn en Esperanto, kaj kiam ili ne sufiĉis, helpis al ni vortoj el la angla, germana, pola, franca kaj bulgara lingvoj. La labortaskoj estis sukcesa kaj la komunikado tre agrabla kaj gaja, ellaborante la simbolojn de EU kun pliprofundigo de la scioj pri la kreado kaj evoluo de EU, kaj la historian antaŭeniron de niaj landoj. Okazis, ke la historioj de niaj ŝtatoj estas tre diversaj, sed ke niaj popoloj estas kunligitaj ekde multaj jarcentoj pli frue. Io alia, estis prezentado de Eŭropa Unio por festi la 9-an de majo la *Tagon de Eŭropa Unio*.

En la mezlernejo, la partneraj grupoj vizitis klasĉambron dum la okazintaj lecionoj pri matematiko, germanlingvo, historio, geografio, literaturo, aŭ kemio kaj konstatis ke la instrumentoj estas preskaŭ la samaj. La gelernantoj, uzinte vortaretojn preparitaj de la geinstruistoj kaj iliajn notojn memore pri siaj novaj geamikoj, vigle partoprenis la orientiĝ-ludon de Vaulx-en-Velin, la interesan trezor-serĉadon en la malnova kvartalo *Sankta Johano* de Lyon, eĉ surprizante la monteton ĝis la *Baziliko de Fourvière*. La spura ludo kaj la futbalmatĉo okupis la divesajn grupojn en la parko *Ora Kapo - Parc de la Tête d'Or*. Ankaŭ tre interesa aranĝo estis ĉe bazaj lernejoj en Vaulx-en-Velin "-tn. "sci-vendejoj" Gelernantoj provis instrui pri landoj, hobiaj, kiel brodi belegajn bildkartojn, fari papermodelojn.



Tamen dum duontago, ili ekskursis al la mezepoka vilaĝo *Péruges*, kie ili devis spure ludi, kaj kie ili gustumis la plat-kukon de tiu vilaĝo, ofertita de la liona klubo *CERL (2)*. Dum tuttaga promenado, merkredo matene, ili malkovris la deklivojn de *Croix-Rousse - Rufa Kruco* - sub malbela vetero... kaj posttagmeze, vizito de la muzeo "*Palaco Sankta Petro - Palais Saint Pierre*".



La parteneraj grupoj el Pollando - Bulgario - Hungario loĝis en *hotelo B&B*, rue Gambetta en Lyon, cele al pli facile atingebla centro de la urbo, sed iom malproksime de la *Mezlernejo Pierre Valdo*. Ĉe la hotelo, vespere, la infanoj el la diversaj partneroj kunvenis en ĉambro por kartludi sed ili bonetose devis iamaniere komuniki inter ili... La instruistoj renkontiĝis en alia ĉambro, priparolinte (-ante ) aferojn. Matene kaj vespere, per metroo kaj buso, ili ĝuis la densan trafikon inter la hotelo kaj la mezlernejo !!!

Dum la oficiala invito en la aludita mezlernejo, estiĝis riĉaj programeroj : la loka orkestro de la lernejo, sub gvido de muzikestro, turka danco el hungara lernantino, tre konata ludo "*1-2-3 suno ĉiuj stopas !!!*", kanto de la himno de EU en Esperanto, ktp... Okaze de tiu invito, la mezlernejestro dankis ĉiujn kunlaborantojn koncerne tiun renkonton, kaj la invitintojn, inter ili reprezentanto de la *Ĝenerala Konsilanto*, de la municipo de Vaulx-en-Velin, respondeculo el *DARIC-Délégation Académique aux Relations Internationales et à la Coopération* dans les RECTORATS kaj la liona klubo

CERL. La traduko farita de *Stephane Leroux* en esperanto, kaj de *Sandra Rougeon* en la angla, ebligis al ĉiuj kompreni la diversajn esprimojn. Post varma aplaŭdo, momenton de la reciprokaj donacoj !... Tuj poste, la bufedo permesis pli amikiĝi inter gustumado kaj trinkado, kaj ĉe aliaj trovi konsilojn por ion same organizi alie...

Ni danku ĉi-jare *Stephane Leroux*, instruisto pri matematiko en la mezlernejo, pro la bona planado de tiu renkonto. Ni dezirus plej bonan progreson al la infanoj por bone praktiki esperanton dum la venonta renkonto oktobre en Hungario, ĉar tiaj renkontoj permesas al infanoj el "zep" - *zone d'éducation prioritaire* - *prioritata eduka zono*, vojaĝi senpage por konatiĝi kun junaj alilandanoj.

(1) franclingve: *collège*

(2) *Centre Espéranto de la Région Lyonnaise*

Raportas *J Catil* el LYON-Liono ( Francio )

Partoprenis( os) :

Urbo **Polski Trambes**, Bulgario – *Lernejo "Canko Cerkovski"* oktobro 2009.

Urbo **Vaulx-en-Velin** - *Mezlernejo Pierre Valdo* – Francio- majo 2010

Urbo **Tiszafüred** - *Kalvina Bazlernejo "Bán Zsigmond"*- Hungario, oktobro 2010

Urbo **Rybnik** - *Szkoła Podstawowa* - Pollando - printempe 2011

Vizitu retejon :

En Bulgario : [http://gvidlibro-2009-2011.webnode.com/dua-laborrenkont\\_igho-2-10-05-2010/](http://gvidlibro-2009-2011.webnode.com/dua-laborrenkont_igho-2-10-05-2010/)

En Pollando : <http://www.miastorybnik.pl/sp34/>

## Daŭra agado de la klubo de Nancy

### "Majo de Eŭropo" – *le mois de mai de l'Europe*

En la centro *Sankta Sebastiano*, de la 3a ĝis la 5a de majo 2010, ni partoprenis en la manifestadoj pri eŭropa festo, organizitaj de la nancia urbo, laŭ la temo "Solidareco kaj reintegrigo".

*Au centre Saint Sébastien, du 3 au 5 mai 2010, nous avons participé aux manifestations de la fête de l'Europe, organisées par la ville de Nancy, sous le thème "Solidarité et réintégration".*

Nia budo, inter tiuj de la *eŭropa vilaĝo*, prezentis diversajn esperantistajn asociojn, kiuj solidarece agas : ... Bona espero, Esperanto-lernejo, Indiĝenaj dialogoj, Mazingira, Monda solidareco kontraŭ la malsano, Reintegrigo kaj esperanto ( *Apsike* ).

*Notre stand, parmi ceux du village européen, a présenté diverses associations espérantistes qui ont une action solidaire : Bona espero ( Bon espoir ), Solidarité par l'éducation, Dialogues indènes, Mazingira, solidarité mondiale, Réinsertion et espéranto ( Apsike ).*



Ni ankaŭ informis la interesitajn vizitantojn pri la lingvo Esperanto.

Lunde, Edmond Ludwig, prezidanto de orient-francia esperantista federacio, venis subteni nin.

*Nous avons également informé les visiteurs intéressés sur la langue Espéranto. Lundi, Edmond Ludwig, président de la fédération d'espéranto France-Est, est venu nous soutenir.*





Marie MARVINGT est née à Aurillac (Cantal) le 20 février 1875.

En 1889 son père s'installe à Nancy au numéro 8 de la place de la Carrière.

**Marie Marvingt découvre l'Espéranto** lors d'une conférence de *Charles Bourlet*, membre du « *Touring-Club de France* » et président du groupe espérantiste de Paris.

Elle apprend cette langue de janvier à mars 1903.

Le 15 avril 1903, elle réussit son diplôme "Atesto pri Lernado".

Elle participe parfois aux réunions du Club Espéranto de Nancy. La dernière attestée a eu lieu une année avant sa mort, en 1962 à la brasserie "Excelsior". (*"La Informilo"*, bulletin de la fédération *Espéranto France-Est*, de Janvier 1956)



**"L'espérantiste française Marie Marvingt, la femme la plus extraordinaire après Jeanne d'Arc"**, c'est le titre d'un article de trois pages avec 7 photos, traduit du journal des Etats-Unis *"The World Veteran"* et paru dans le numéro de décembre 1955 de *"La Praktiko"*.



Jacques Boetsch, l'auteur, y écrivait " *Elle était convaincue que le monde devait introduire une langue commune internationale. Quand elle a entendu parler pour la première fois de l'Espéranto, elle a tout de suite été enthousiaste pour apprendre cette langue, et depuis, elle la pratique et la fait connaître avec ferveur.*"

Le journal espérantiste "la Movado" annonce, dans son 48<sup>ème</sup> numéro de janvier 1914, que Marie Marvingt a été blessée dans un accident, le 12 décembre 1913, près de Reims.

Une photo la montre avant son départ en montgolfière, pendant des fêtes à Chalon-sur-Saône. **Elle tient dans une main un petit drapeau espérantiste**, que lui a donné M. Richard, le président du groupe espérantiste de Chalon-sur-Saône.

Marie Marvingt est connue surtout comme une pionnière de l'aviation en France. Licenciée en lettres classiques, elle parlait six langues, dont l'espéranto.

Décédée à Nancy le 14 décembre 1963, elle est inhumée au cimetière de *Préville*.

( affichette documentaire, utilisée par des animateurs du club *ESPERANTO-Nancy*, lors d'une présentation de la langue au collège Marie MARVINGT à Tomblaine (54).

Marie MARVINGT détient le palmarès inégalé de 17 records sportifs mondiaux et 30 décorations



photos internet

NB - de la rédaction (*La Informilo*) : le 1<sup>er</sup> novembre 1960, à l'âge de 85 ans, nantie de son diplôme brillamment acquis de pilote spécialisée, elle se met aux commandes de l'hélicoptère « *Djinn 1221* ».

Un an après, elle gagne Paris à bicyclette et survole la capitale à bord d'un hélico à réaction.




## OMAĜO al PORTUGALIO per BONJOUR, VOISIN !

Okazis la sesa aranĝo « Bonjour, voisin ! », la 10-an de aprilo 2010 en la urba mediateko. La temo pritraktis Portugalion.

Ĉeestis pli ol dudek personoj. Inter ili samideanoj Ludwig Edmond kaj 2 Germanoj.

La parton « geografio kaj turismo » ilustris bilda disvolvigo per « powerpoint » ; historio ampleksis la prahistorion ĝis la nuntempa aliĝo de Portugalio al Eŭropunio ; literaturan parton beligis legaĵoj el verkoj de José Saramago (Nobelpremiito), Lidia Jorge kaj Fernando Pessoa.



Karavelume

Dufoje po jaro la grupo prezentas landon de EU. La prelego celas omaĝi al kuncivitana popolo. Esperanto tiel aperas ne nur kiel lingva afero, sed klopodo por plia interesiĝo al la eŭropa komunumo. Esperantoparolantoj ne solecas kiam temas pri Eŭropunio : dudeko da aŭskultantoj – pro ilia ĉeesto - bontaksas la agadon de nia grupo promociante tian interkonigan alpaŝon. Eble ili opinias, ke estas memkomprenebla afero por esperantistoj.

## ARDO KAJ GLORO

Antaŭnelonge S.ino Henriette Walter, lingvistino, eksa profesoro ĉe Sorbonne, prelegis en urba mediateko pri sia verko « Aventures et mésaventures des langues de France », (aventuroj kaj misaventuroj de la lingvoj en Francio).

Ŝi geografie lokigis la lingvojn flankantajn la oficialan francan, lingvojn, kiuj karakterizas regionojn en nia lando, nome provenca, kataluna, okcitana, vaska, bretona, flandra, franka, alzaca, korsika, ... kaj kreolaj. Ili estas dek lingvaj valoraĵoj el la tuto de 75 lingvoj praktikataj sur nia grundo. Ili malpli stampas minoritatojn, ol difinas areojn kie enloĝantoj ofte estas denaske dulingvaj. Tiujn distranĉojn de la nacia tuto okazigis streĉaj kaj ampleksaj popolmovoj kaj politikaj premoj de 1000 jaroj kaj antaŭe. Tiuj pralingvoj efike rezistis al strikta « formatiko » far la ĉirkaŭo.



La prelegantino celis subteni klopodojn de loka asocio, kiu baraktas vivteni la frankan dialekton en la Moseldepartemento. Ŝi do substrekis la valorojn de tiu pralingvo, antaŭanta la germanan, kaj kiu ja estis la lingvo de Karolo la Granda. (Ĉu ne fieri paŝante post tiu imperiestro ?)

En Korsiko kaj Vasko la lingvo sakriĝis. Ili pro tio iĝis sukcesaj defendiloj de specifa kulturo kaj kunvivo. Tiuj du lingvoj ne submergiĝos. Kial do la Mozelfranka suferas pri ekstermo ? Unu respondo estas : ĉar ardo kaj fervoro de lingvouzantoj por sia lingvo malfontis.

Ĉeestante la prelegon, oni kompreneble pensas pri Esperanto. En sia eseo « Langues sans frontières », Kersaudy opinias, ke Esperanto jam finvenkis.

Nu, ni observu ! La lingvo ja konkeris grandparton de la mondo, ĝin oni devas enkalkuli inter la lingvoj de la homaro; ĝia literaturo respegulas specifan kulturon, tiun de ekunuiĝanta homaro ; ĝi efike nestas en nuntempa regilo, la Reto, samkiel oficialaj, naciaj lingvoj ; ĝi pruvis sian ekzistorajton iĝante ilo de interpopola kompreniĝo laŭ homrajtoj.

La gloro de la lingvo Esperanto jam brilas. Ni zorgu pri la ardo vivteni ĝin !

A.Hubert

## Rencontre

Voici deux galets. Ils sont nés très loin l'un de l'autre.

Un vif courant les a réunis.

La compréhension mutuelle nécessite parfois du silence.

Mais elle se construit avant tout avec l'écoute, le dialogue ...

Et elle nécessite un courant partagé.

## Renkontiĝo

Jen du rulŝtonoj. Ili naskiĝis dise en foro.

Arda fluo kunigis ilin.

Interkompreniĝo kelktempe neprigas silenton.

Sed ĝi ampleksiĝas per aŭskultado kaj dialogo ...

Kaj partigita emo ĝin okazigas.



坐井观天

Ne rigardu la ĉielon  
sidigante vin en puton !

Elektante Esperanton,  
ni fuĝis la puton por ĝui pli vastan mondrigardon.  
( Eĉ praĉinoj pravigus tion. )

## NI FESTIS EN SKOKOVY

La 30a jubilea Lingvo-seminario okazis de la 12a ĝis la 18a de aprilo 2010 en Ĉeĥio, en la kutima loko de la Ĉeĥa paradizo. Ni okupis la pensionon Espero en la vilaĝeto Skokovy. La aranĝon organizis AEH-klubo de la urbo Pardubice kaj la programon ellaboris kaj lerte gvidis Jana Křížková el la urbo Česká Třebová. Inter 45 gesamideanoj, precipe el Ĉeĥio, venis gastoj el Slovakio, Pollando, Germanio, Nederlando kaj Francio. Dum la lunda inaŭgura vespero la prezidanto de AEH Pavel Nechvíle bonvenigis la partoprenantojn, Jana anoncis la detalan ĉiutagan programon kaj poste estis prezentita filmo pri la tridekjara historio de la aranĝoj en Skokovy. La plej fidelaj partoprenantoj ricevis memorigan ateston kaj donaceton.

Ĉiutage, antaŭ la matenmanĝo, okazis gimnastikado, kiun gvidis Jana. Je la 9a horo komenciĝis la instruado en tri-nivelaj E-kursoj. Post la tagmanĝo estis libera tempo por piedpromenoj en la bela ĉirkaŭaĵo kaj al turismaj allogaĵoj. Dum la posttagmezaj

manlaboroj oni fabrikis papiliojn el perloj aŭ el paperaj teosaketoj. La vesperoj estis dediĉitaj al pli kompletaj prelegoj.

Marde vespere Magdalena Fejfičová el Slovakio montris surekrane kaj parolis pri la historio de la slovaka mono kaj pri la eŭro. La prelego estis tre interesa kaj plaĉa.

Merkrede posttagmeze estis antaŭvidita ekskurso al Pěnčín. Tie ni vizitis farmbienon, kie oni bredas kaprinojn kaj fabrikas fromaĝojn. Ni spektis filmon pri la produktado de fromaĝo, poste ni gustumis divers-spicigitajn produktojn kaj povis aĉeti ilin. En la sama loko troviĝas vitro-produktejo, kiun ni ankaŭ vizitis. En la urbo Železný Brod ni povis vidi produktadon de rulitaj bidoj kaj etnografian ekspozicion en la loka muzeo Bělišťe. Ĝi estas la plej granda ĉizita konstruaĵo en Železný Brod. Vespere ni eksciis pri preparado de diversnaciaj specoj de pudingo. Konataj estas ĉirkaŭ 80 variantoj; dolĉaj kaj salaj. Sekvis interesa inform-prelego pri diversaj arboj kaj filmo pri la Internacia Festivalo kiu okazis jarfine en Germanio.

Ĵaŭde vespere la partoprenantoj povis spekti filmojn pri Venezuelo gustumi tiean konfrititan frukton gojavo kaj admiri ekspozicion pri kelkaj muzikiloj, albumoj, bildkartoj kaj diversaj memoraĵoj. Dum dancado ekestis gaja etoso kaj muzikado.

Vendrede, post la promenado, Jarda Pokorný interese rakontis pri mineraloj kaj ŝtonoj trovitaj dum promenado kaj ankaŭ pri aliaj arbaraĵoj. Li instalas interesan ekspozicion de la trovitaĵoj. Je la 20a horo komenciĝis gaja vespero per vintostado. Sekvis

kantoj, poemoj, spritaj versaĵoj, anekdotoj, kvizo, amuzaj scenoj kaj ŝercoj. Riĉa tombolo altiris partoprenantojn kaj baldaŭ ĉio estis distribuita. Poste ni komune kantis esperante, ĉeĥe kaj eĉ ruse ĉe gitar-akompano.

Sabate estis la lasta tago por profiti la kutiman tut-tagan programon. Vespere ni havis okazon aŭdi interesan prelegon pri la grafino Bertha von Suttner, kiu estis la unua virino premiita per Nobel-premio. Ŝi ankaŭ parolis Esperante. Per tio la programo finiĝis. Ni ankoraŭ restis en amika rondo kantante kaj babilante. La aranĝo estis tre sukcesa, ni ĝuis tre agrablan semajnon en amika rondo.



dans notre rubrique ... peufinons notre argumentaire

## Le maire de la ville-espéranto répond ...



Un des habitants les plus occupés de la ville allemande **Herzberg-am-Harz** est certainement son maire, *Gerhard Walter (GW)*.

Mais notre correspondante à Herzberg, *Malgosia Komarnicka (MK)*, a pu le convaincre de trouver un peu de temps pour répondre à quelques questions, en exclusivité pour "La Ondo de Esperanto".

Car Gerhard Walter est le premier maire de la première et actuellement **la seule ville-espéranto (1) au monde**. Ce n'est pas sa seule caractéristique. Il est toujours souriant, chaleureux, amical ; pendant les rencontres officielles, il trouve toujours le temps d'échanger quelques mots presque avec chaque personne ; **mais le plus important, c'est qu'il apprend l'espéranto**, et il trouve toujours un moment pour les espérantistes. Les premières questions ont porté sur l'espéranto.



( Interview paru dans le mensuel espérantophone *La Ondo de Esperanto* 2010, N°6, traduit par *krokodilo* et publié dans le média citoyen « Agora Vox » du samedi 12 juin ).

*MK ... « Êtes-vous conscient d'être un maire unique et atypique ? Principalement, parce que vous défendez et soutenez ouvertement l'espéranto ?*

- *GW* : Oui. Je suis un peu comme Don Quichotte. J'ai vite remarqué que beaucoup de mes collègues n'ont pas réalisé que l'espéranto est une chance.

*MK : Pourquoi apprenez-vous l'espéranto ?*

- *GW* : Parce que des citoyens d'Herzberg, très actifs, enseignent cette langue et travaillent en sa faveur. En tant que maire, je dois le refléter.

*MK : En apprenant l'espéranto, vous vous êtes déjà fait une idée de ses avantages et ses inconvénients. Pouvez-vous nous les indiquer ?*

- *GW* : Les avantages : la rapidité d'apprentissage. Les inconvénients : **de trop nombreux préjugés**, et un manque de soutiens à des postes influents.

*MK : Selon vous, existe-t-il des perspectives pour l'espéranto dans le futur ? La Pologne peut-elle jouer un rôle particulier dans son développement ?*

- *GW* : Je pense que l'espéranto restera encore un « hobby » pendant des décennies. Imaginez si les Britanniques devaient demain conduire à droite ... Les structures sont trop rigides. En Pologne, cela pourrait être plus facile qu'en Allemagne. Là-bas, on pourrait à mon avis « décréter » que l'espéranto est quelque chose de positif. Parfois, on doit pousser les hommes vers leur bonheur. En Allemagne, c'est difficile.

*MK : Selon vous, l'espéranto pourrait-il être une « langue-pont » entre les hommes des divers peuples ?*

- *GW* : Tout à fait. Je le vis tous les jours à Herzberg. Il y a quelques années je n'aurais pu imaginer par exemple, que des Asiatiques et des Africains communiquent entre eux par l'espéranto, et non en anglais !

*MK : A votre avis, quelle devrait être la première qualité d'une langue internationale ?*

- *GW* : Je répondrais que l'espéranto est très facile à apprendre, surtout pour ceux qui ont déjà appris le latin, l'anglais ou le français.

*MK : Selon vous, l'idée d'une langue internationale rapprochant les hommes est-elle trop idéaliste dans le monde qui est le nôtre aujourd'hui ?*

- *GW* : Oui, c'est ainsi.

MK : *En tant que maire de la ville-espéranto, vous rencontrez souvent des espérantistes. Quel souvenir gardez-vous principalement de ces rencontres ?*

- GW : Des gens sympathiques, très engagés, malheureusement trop peu nombreux à des postes influents.

MK : *Au Parlement européen, il y a une forte opposition à l'espéranto comme langue européenne commune, bien que l'espéranto se soit montré une solution efficace pour la communication internationale. D'après vous, quelle est la raison de cette attitude ?*

- GW : Chaque homme s'en tient à ce qu'il a appris, dont il dépend. **C'est seulement lorsque l'espéranto sera enseigné à l'école comme une vraie alternative que l'idée aura sa chance.**

MK : *L'idée de l'espéranto est, d'une certaine façon, idéaliste. Les hommes, pris individuellement, réalisent leurs rêves au moyen de cet idéalisme. Les politiciens et les professionnels des langues trouvent des arguments contre l'espéranto. Pourquoi, d'après vous, n'existe-t-il pas de consensus sur les qualités linguistiques de l'espéranto ?*

- GW : Comme je l'ai déjà dit, chaque homme pense d'abord à lui-même. Pourquoi chacun n'apprendrait-il pas d'abord l'anglais, l'espagnol ou le français ? L'espéranto n'a pas actuellement de lobbyistes qui parlent en sa faveur.

[ ... / ... ]

(1) Le nom de " *Die Esperanto-Stadt* " -Ville de l'Espéranto-, adopté en 2006 par décision du Conseil Municipal, apparaît désormais sur la page d'accueil du site web de la cité.

NB - Article original également sur " *La Ondo de Esperanto* " en ligne.

## 18-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO EN COMA-RUGA Hispanio

**Tiu internacia semajno de Kulturo kaj Turismo estas jam tradicia ferio-semajno, kiu okazas fine de septembro aŭ komence de oktobro en Katalunio. Ĝin kutime partoprenas 100 ĝis 150 personoj. Malgraŭ aŭtuno eblas ankoraŭ ĝui la someron, la strandon, la maron kaj Esperanto-etoson.**

**En 2010 ĝis okazos en Coma-Ruga, proksime al Tarragona de la 2-a ĝis la 9-a de oktobro 2010. Fakte Coma-Ruga apartenas al la municipo El Vendrell. La tuta restado okazos en en 3-stela Hotelo Natura Park, ĉe Strato Vilafranca 10-14.**

**Aliĝ-kotizo 20 € ĝis 31.07.2010 poste 30 €**

**Kompleta pensio en la hotelo: 34 € en dulita ĉambro po persono kaj tago, 44 € en unulita ĉambro.**

Informoj kaj aliĝiloj ĉe:

**<http://personales.ya.com/semajno>**

Koresponda adreso:

**Luis Serrano Pérez. Apartado 423.**

**ES-08200 SABADELL Hispanio**


Tel. (34) 93 727 50 21.

Retadreso: **[luis\\_serrano@mixmail.com](mailto:luis_serrano@mixmail.com)**



# Nova diplomverko pri Esperanto

(De [arosev@gmail.com](mailto:arosev@gmail.com), 2an de junio 2010, tra *Vladimir Minin*, tra la listo reago)



La 31-an de majo 2010, en *Jekaterinburg*, juna studentino, *Arina Osipova*, diplomiĝis pri la temo "Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de la germana lingvo".

Ŝi studis en la *Urala ŝtata pedagogia universitato (UŜPU)*, instituto de fremdaj lingvoj. Arina preskaŭ ne diskonigis informon pri temo de sia diplomverko, tial nur hazarde oni povis informiĝi pri la bonega fakto.

Kiel rakontis mem Osipova, jam profesia instruistino de la germana, ŝi lernis Esperanton *antaŭ kvar jaroj*, kaj kiam venis tempo elekti temon de diplomverko, ŝi decidis kunigi Esperanton kaj la studadon. Arina multe interesiĝas ĝuste pri propedeŭtiko, tial komence ŝi volis pristudi nur ĝin,

kiel Esperanto ĝenerale helpas lerni lingvojn, ne iun konkretan.

Sed dekanino de ŝia fakultato estis ege kontraŭ Esperanto ("... *En la mondo estas tro da problemoj pri la normalaj lingvoj, kaj vi alŝovas la artefaritan!*... " – citaĵo). Do, laŭ la dekanino, oni povas okupiĝi pri Esperanto nur "hobi-nivele", sed ne scienc-cele.

Tial baza problemo estis trovi sciencan gvidanton de la diplomverko – pedagogoj en UŜPU jen timis la temon, ĉar nenion sciis, jen ne vidis sencon okupiĝi pri tio. Klariĝis ankaŭ, ke inter la lingvistoj ekzistas opinio, ke *propedeŭtika rolo de Esperanto estas memevidenta*, kaj oni ne devas ion ajn pruvi ĉi-rilate. Krome, laŭ ili, ne necesas enkonduki Esperanton en alt-lernejojn kiel devigan studobjekton, ĉar "*latino tute bone plenumas rolon de Esperanto*"...

Post la diplomiĝo, Arina ankaŭ intencintus fariĝi aspiranto, sed kun ĉi tiu temo la afero estas malreala, oni ne lasos ŝin doktoriĝi ĉi-prie. Ŝi diris, ke antaŭ jardeko, iu en UŜPU provis skribi sciencan verkon pri Esperanto, sed malsukcese.


Arina ricevis kiel gvidanto instruistino de la franca, kiu iam lernis Esperanton, sed rilatas al ĝi ne serioze. Krome, ŝi ne regas la germanan (pri kiu ĉefe temas en la verko de Arina). Tial Osipova devis fakte labori memstare, la gvidantino helpis nur pri stilaj nuancoj kaj organizaj aferoj.

Ŝi laboris dum du jaroj. Pasintjare, ŝi analizis *E-rusan vortaron* de *A. Ŝevĉenko*, kaj krome uzis etimologian vortaron de Esperanto – ŝi serĉadis germanajn radikojn en E-vortoj. Osipova faris jenan eksperimenton: ŝi proponis al 22 esperantistoj kun malsama E-lingvokono, kaj nenioma rego de la germana, traduki el la germana apartajn vortojn, apartajn frazojn kaj malgrandan tekston. Por la tuta traduko ŝi liveris al eksperimentatoj 45 minutojn. Rezulte de la traduka laboro *evidentiĝis, ke la hipotezo pri la propedeŭtika estis plene konfirmita kaj la celo ... atingita*.

Osipova ricevis plej altan poenton, recenzo estis pozitiva kaj sen korektoj aŭ rimarkoj. La atesta komisiono ĝenerale rilatis neŭtrale, sed faris bazajn demandojn ... " *Kial Esperanto sed ne la angla, ĉu Esperanto helpis lerni la germanan, ĉu Esperanto estas ie lernata kiel studobjekto?* " Krome oni petis, ke Arina diru ion en Esperanto – ŝi citis la unuajn kvar versojn de zamenhofa "*La Espero*".

Do brava Arina Osipova meritas admirojn pro persistemo, gratulojn pro la diplomiĝo kaj dankojn pro sia kontribuo al diskonigo de Esperanto inter uralaj lingvistoj.

G. Arosev



## Nova magistra disertacio pri "Esperantaj periodaĵoj"



La 25-an de majo *Dima Ŝevĉenko* (i.a. funkciiganto de la retejo "[www.esperanto.com](http://www.esperanto.com)") defendis sian magistran disertacion pri *Periodaĵoj en Esperanto* - kun la noto **perfekta**.

Tio okazis en *Rusia Universitato de Amikeco inter la Popoloj* (unu el ĉefaj rusiaj universitatoj). Lia oponento/recenzanto estis fama esperantisto *M.I. Isajev* (doktoro, profesoro, akademiano).

Pliajn detalojn, enhavliston, fotojn kaj komentojn vi povas trovi ĉe: <http://www.ipernity.com/blog/55113/252420> -

Lia kontaktadreso: [retumanto@heliko.gmail.com](mailto:retumanto@heliko.gmail.com).

laŭ [e-rus-info]

fonto: Ret-Info

<http://www.eventoj.hu>

Jen du informoj, kiuj atestas ne nur la valoron de la internacia lingvo cele akiron de elstara diplomo, sed kiuj plue pruvas, ke universitataj instancoj en pluraj landoj agnoskas ĝin kiel gravan idiomon, apud ĉiuj etnaj lingvoj. Jen kio ebligas "silentigi" certgrade la kutimajn misfamigantojn de esperanto ...

## ... pri novaj esperanto-retejoj ...



Komunumaj retejoj estas oportunaj lokoj por kunigi homojn kun simila intereso. Post la jam malnova ipernity antaŭ kelkaj monatoj en Ret-Info, ni raportis pri ekfunkciado de [esperanto.com](http://esperanto.com), kaj nun kun ĝojo ni informas pri 3 aliaj retejoj.

1 - [esperanto.ning.com](http://esperanto.ning.com)

La portalo [ning.com](http://ning.com) donas hejmon al multaj komunumoj en multaj lingvoj,

do kompreneble troviĝas ankaŭ retejo por E-parolantoj sub la adreso <http://esperanto.ning.com>

Krom partopreni la tian vivon, vi povas krei tute senpage propran tian retejon ankaŭ por via loka E-klubo aŭ E-societo.

## 2 - Edzperanto - Trovu edz(in)on tra Esperantujo!!

En nia centjara historio jam okazis multaj geedziĝoj inter esperantistoj. La nova retejo Edzperanto volas helpi ĝuste en tiu kampo - analoge al multaj similaj nacilingvaj servoj.

Edzperanto estas nova kaj senpaga servo. Jen frazo en la titolpaĝo: "... Bonvenon ĉe Edzperanto, la unua interreta renkontoj-servo sur la TTT. Kreu vian profilon sur Edzperanto kaj komencu serĉi vian estontan edzon!!! ..."

Trovu novan edz(in)on ĉe: <http://www.edzperanto.org> ! - Sukcesojn kaj feliĉon!

## 3 - Rilatoj.net

Rilatoj.net estas nova socia retejo, kun pluraj, diversaj servoj. Ĝi estas interkona retejo por esperantistoj. Vi povas uzi ĝin por interŝanĝi fotojn, babilumi, kaj en la estonteco ankaŭ por aliaj servoj.

Rilatoj.net uzas tradukon de la jam ekzistanta programo Dolphin ( BoonEx products ). Ĉar la tradukanto estas franca, li baziĝis sur franca traduko. Se kelkaj paĝoj hazarde aperas en la franca, aŭ en la angla, tio nur signifas, ke mankas iu traduko.

Kvankam kelkaj servoj estas pagendaj, Rilatoj.net ne havas profitan celon. La mono, kiun vi elspozos por la pagendaj servoj, estos uzata nur por pagi la internajn kostojn kaj aĉeti tion, kio necesas por funkciigi ĝin: lui pli pezan gastigan komputilon, aĉeti komercan permesilon de Dolphin por viŝi la reklamojn, kaj aldoni pliajn servojn.

Aliĝu al la nova komunumo de esperantistoj kaj alŝutu fotojn, videojn, muzikon, kreu blogon, desegnaĵojn, interŝanĝu materialon danke al anoncetoj, babilu kun aliaj membroj, organizu eventojn, kun ebleco mastrumi la aliĝintojn, ktp.!

Vizitu la retejon ĉe: <http://rilatoj.net>

L. Szilvasi

fonto: Ret-Info



## pri "LA VORTARO" ...

Karaj abonantoj,

Por sekvi la informadkan evoluon, necesis ankaŭ evoluigi "LA VORTARON", kiu ne bone funkciis sub *Vindozo*, *Vista* kaj *Seven*.

Kun *XP*, tiuj du programoj estas nun la plej uzataj mikrosoftaj operaciumoj dum *Vindozo 95* kaj *98* aspektas kiel arkaikaĵoj.

La aspekto de la programo kaj ĝiaj funkcioj ne estas ŝanĝitaj, tamen modifoj videblas de la uzanto en la nova versio :

- la instalprogramo nun funkcias kiel ĉiuj similaj programoj kaj ebligas ankaŭ aŭtomatan malinstaladon.
- licenco klarigas la uzo-raĵojn de la programo.
- la re-akirado de propraj aldonaĵoj kaj listoj kaze de aktualigo de vort-listoj estis aŭtomatigita (tiu funkcio anstataŭigas nian re-akirilon nun senutila).

ATENTON !

Antaŭ ol instalati la novan version, bonvolu legi la paĝon, kiu koncernas la instaladon de la programo kaj de la vortlistoj. *Viaj rimarkoj estas bonvenaj !*

10 / 05 / 2010 Bernard(o)

Nu ... eble utilas ankaŭ rememorigi al vi la retejon de nia asocio **Esperanto France-Est**

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>


Ni malmodeste asertu, ke ĝi estas verŝajne unu el la plej inform-riĉaj de la francaj Eo-retejoj. Alklaku ... kaj konstatu !

## Pri filmo de Sam Green ...

"Utopia in Four Movements" ( angla lingvo )

"Utopio en kvar movimentoj"

( rolis interalie Peter Baláž ... Aŭdiĝas voĉoj de *Humphrey Tonkin* kaj de aliaj esperantistoj )



En la usona filmfestivalo *Sundance* okazis fine de januaro la premiero de la filmo "Utopia in four movements" de reĝisoro *Sam Green*. La titolo de la filmo ( "Utopio en kvar movimentoj" aŭ "Utopio en kvar movadoj" ) referencas al la tradicia konstruo de simfonio kaj al sociaj movadoj.

Unu el la movadoj estas la esperantista, kiun *Sam Green* observis kaj filmis i.a. en kongreso de la usona landa asocio *ELNA* kaj en la *Universalaj Kongresoj* en *Florenco*, *Jokohamo* kaj *Roterdamo*. La nuna tempo estas laŭ *Green* malamika al utopioj, sed malgraŭ tio, diversaj idealistoj plu persistas, ne perdante siajn idealojn, kaj la simpatio de la reĝisoro estas ĉe ili.

*Sam Green* estas renoma kinisto, kies dokumenta filmo "The Weather Underground" (2003) pri la tiunoma radikala usona movado en la 60-aj kaj 70-aj jaroj estis nomumita por "Oskaro".


Multaj esperantistoj helpis al *Green* en diversaj stadioj de la estiĝo de lia nova verko. Li ricevis asiston i.a. de *ELNA* ( *Esperanto Ligo por Norda Ameriko* ) kaj *ESF*. *La Centran Oficejon de UEA* li unuafoje kontaktis fine de 2005. Dum la *Internacia Filmfestivalo de Roterdamo* en januaro 2006, en kies programo estis unu el liaj filmoj, *Green* vizitis *la Centran Oficejon* por esplori en la *Biblioteko Hodler* kaj por prepari ĉeeston de sia skipo en *Universalaj Kongresoj*. (laŭ gk de *UEA*).

NB - pri la evento, ret-mesaĝo de *Henri MASSON* atentigas ...

"... Kvankam la iniciato de *Sam Green* estas salutinda, ĉefe en tio ke tiu filmo ebligas enkonduki debaton, aperas en ĝi gravaj mankoj, kaj oni devas trovi rimedon por sciigi tion al li kaj al la publiko, kiu spektos tiun filmon. Ekzemple, li sciigis, ke la hispana estas unu el la fontolingvoj de Esperanto. Tio estas tute falsa, ĉar *Zamenhof* ne scipovis ĝin. Tio, kompreneble, ne malhelpas ke ekzistas multaj similecoj inter Esperanto kaj la hispana, ĉar ambaŭ kaj aliaj havas komunan ampleksan latinan fonton. Mi dubas, ke li ricevis tiun falsan informon de seriozaj esperantistoj, kiujn li konsultis, i.a. de *Humphrey Tonkin*. Do, ĉu eble en iu enciklopedio ? Ĉar ekzistas efektive tiaj falsajoj en diverslingvaj nacilingvaj enciklopedioj. Pri tio mi jam foje skribis ke ni devas esti atentemaj.

Kaj ĉefe, mankas sekvencoj **pri la nuntempa Esperanto** . Pri tio tute ĝuste aludis *Lu*. Pri tio atestas multaj ligiloj de "L'espéranto au présent" — Esperanto nuntempe — al kiu mi devis aldoni duan parton ! kaj pasintjara raporto pri "Profesia aplikado de Esperanto"; ankaŭ vizitinda estas paĝo de la retejo de *James E. O'Neill* kun multaj ligiloj : <http://www.arionshome.com/esperanto/eo-links>

Ni informu, ke la koncerna eltiraĵo estas spektebla ĉe <http://filmoj.net/utopio-en-kvar-movimentoj> kun **esperant-lingva** subteksto ( gratulojn kaj dankon al "*Verda Filmejo*" ! ).








# El nia libroservo

## Informoj

⇒ La tuta listo de niaj libroj nun aperas en la regiona retejo :  
**esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr**

⇒ La libroservo partoprenos la komunan semajnfinan staĝon organizitan de Bavelo en Rastatt la 17/19ajn de septembro kaj la Mozellandan Esperanto Semajnfinojn en Marienburg (Rheinlando-Palatinato) la 8/10ajn de oktobro.

Multaj el niaj 680 titoloj atendas vin tie sed se vi volas certe trovi dezirata(j)n libro(j)n, sen devigo ĝin (ilin) aĉeti, sendu al mi mesaĝon al [libroservo.ef@wanadoo.fr](mailto:libroservo.ef@wanadoo.fr) JLT

## Nove alvenintaj libroj : por progresi en esperanto...



1



2



3



4

1) **La bildstrioj kiel lernolibroj**, lernolibro, Michel Dechy, *Esperanto* (2010), 32 paĝoj, 6,00 €.

Tre belaspekta lernolibro en kiu Tinĉjo helpas nin progresi en esperanto, dank' al ilustraĵoj de la tri albumoj tradukitaj esperanten kaj al komentoj pri la tuta serio de aventuroj de la fama ĵurnalisteto. Inda por progresiga kurso de kultura semajnfino,

2) **Rim-enigmoj**, infana lernolibro, Elena Popova, ilustraĵoj de Miroslava Tomeĉkova, *Kava Pech* (2009)

56 paĝoj. 6,00 €. Dank' al rimaretoj kaj desegnoj, infanoj trovu la nomon de 34 bestoj, kiujn ili poste kolorigu. Librofinaj paĝoj ankaŭ donas la tradukojn de la bestonomoj en 12 lingvojn.

3) **Multlingva frazlibro**, frazlibro Yohanes Manhitu, *U.E.A.* (2008), 144 p, 7,50 €. Ordinaraĵoj grupitaj en 34 temoj kaj tradukitaj al ok lingvoj (indonezia, davana, tetuma, kupanga, angla, franca, hispana, portugala).

4) **Kunci – Esperanto**, vortareto, Goes/Mulyadi, *U.E.A.* (2009), 48 p, 1,20 €. Nova, moderna ŝlosilo indonezia kun esperanto-indonezia vortlisto.

## Por mendi librojn :

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la dorsflankan mendilon)

- per e-poŝto al «[libroservo.ef@wanadoo.fr](mailto:libroservo.ef@wanadoo.fr)»

- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97


BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo




## ... por esplori esperanto-kulturon...



1



2



3

1 **Bonvenon en nia mondo**, Lernolibro, **Bent Jensenius**, *Kava Pech*, 128 p, **12,00 €**. 27 ĉapitroj por samtempe progresi en la lingvo kaj malkovri la diversajn erojn de la esperanto movado : kongresoj, kulturdomoj, revuoj...La konstruo iom similas tiun de "Vojaĝo en esperanto-lando" sed pli facile alireblas por komencantoj,

2 **Intimaj temoj**, Esperanto-beletro , **Petro Chrdle**, *Kava Pech*, 104 p, **9,00 €**, prelegkolekto de la kontribuoj prezentitaj dum la samtema Internacia Esperanto Konferenco, aranĝita de OSIEK en Prago en 2003.

3 **Ĉu kultura integriĝo de Eŭropo?** Pripensado, **Jiri Laŭbe**, *kava Pech*, 32 p, **2,10 €**. Propono uzi esperanton por savi la multlingvecon en Eŭropo.

## ...por ĝui romanojn kaj malkovri biografiojn



1



2



3



4



5

1. **La Grafo de Monte Kristo**, Romano, **Alexandre Dumas**, *F.E.L.*, 2 volumoj : 1184 p, **79,00 €**. Fama verko de unu el la plej grandaj francaj romanistoj de la 19a jarcento, tradukita de Daniel Moirand.

2. **La ville de pierre**, Romano, **Anna Löwenstein**, *Ginette Martin*, 336 p, **20,00 €**. Franclingva versio de verko, kiu konis grandan eldonsukceson, esperantlingve. Traduko de Godeleine Logez, laŭ iniciato de nia samregionano Ginette Martin,

3. **Jim la migrulo**, Romano, **Siegfried Stampa**, *Kava Pech*, 176 p, **13,80 €**. Aventuroj de juna leopardo.

4. **Paolo, la lernanto de Leonardo Da Vinci**, Romano, **Hans Ulrich**, *Kava Pech*, 112 p, **9,90 €**. Vivo de knabo en Florenco, dum la Renesanco.

5. **Heroo de amo**, Biografio, **Karel Kraft**, *Kava Pech*, 196p, **12,00 €**. Vivo de la ĉeka humanisto Pfmysl Pitter.

## Mendilo

Bonvolu sendi tiujn librojn:

-  
-  
-  
-  
-

al jena adreso:

S-ro/ino  
-  
-  
-  
-

En

la

Subskribo:

Someras, jen somero !

Fine alvenis ĉijare la sezono de ripoziĝo, malstreĉiĝo, amuziĝo. Ankaŭ LA INFORMILO -espereble-konsentas aperigi paĝon pri iu temo, ne tre konvena al ĝia profilo...



Lasu do iun kuriozan, eksterkutiman temon, nome elvoko de unu el la "grandaj homoj" el nia malgranda lando, eniri la bultenon !

Ĉu vi jam scias, ke koncerne la *Nobel-Premio*-nombron, po ĉiu (persono), Hungario estas la unua en la mondo ?

Krome, ni povas fanfaroni pri aliaj sennombraj scienculoj, inventistoj, ktp...

Nu, mi cerbumu redakti liniojn pri la mondfama *Rubik-kubo*...

La *Rubik-kubo*, alia nomo *Magia kubo* estas "mekanika", individua ludo. La granda klubo konsistas el pluraj kubetoj; ĉiu flanko de la klubeto havas malsaman koloron... Tiuj kubetoj estas deturniĝeblaj ĉirkaŭ la centro de la edro. Dum la turnado/rotacio, la koloroj de la

eksteraj flankoj de ĉiu kubeto ŝanĝiĝas... Oni povas esti entute **43 252 003 274 489 856 000** malsimilajn poziciojn !

La celo de la ludo estas, ke el la antaŭe intermiksigitaj kubetoj, oni re-estigu per rotacio la originalan, aranĝitan kolor-kunmetadon, nome ke ĉiu flanko de la granda kubo havu apartan ĝeneralan koloron.

La *Magia kubo* naskiĝis en 1974. La inventisto, *Ernő Rubik*, en tiu tempo, estis profesoro en la *Meti-arto Universitato/altlernejo* de Budapeŝto.

La "kubo" apartenas al la plej originalaj ludoj. Ĝi estas tridimensia, ĝiaj multaj elementoj samtempe moviĝas. E. Rubik speciale prizorgis la estetikajn koloron.

Konfeseme, por re-estigi la finan, kontentigan rezulton, li bezonis longedaŭrajn eksperimentojn. Kiam la sopirita rezulto plenumiĝis, sekvis la granda travivaĵo, kiun, de tiam, multaj milionoj da homoj travivis !

Estas konsterniĝo konstati, ke tiu tasko -ŝajne simpla laŭ unua ekrigardo- iĝas fakte malfacila!

E. Rubik -laŭ sia konfeso- malkovris, ke tiu kubo estas taŭga, ne nur por demonstri principe la movon en spaco, sed ke ĝi estas plue bona ludo, sekve ke

li povas utiligi sian scion/sperton, por komerci/vendi tion !

Liaj amikoj kaj studentoj kuraĝiĝis/entuziasmiĝis lin. *Rubik-kubo* tiel enkomerciĝis en la jaro 1977.

Ĝi ricevis multajn premiojn en Germanio, Francio, Anglio, Usono, ktp. Tiu "kubo" vekis la atenton de milionoj da homoj en la tuta mondo. Oni organizas klubojn, konkursojn ktp.

Iu "*Rubik-kubo Monĉampionado*" okazis en Budapeŝto en 1982. En la nuntempo ĝi havas ian renaskiĝon.


"Eco" de la kubo, por tiu, kiu komencis "knedi" ĝin, povus ĉesigi la provadon ...

S-ino Schmidt el Düsseldorf, Germanio, komencis divorc-proceson, transigante la respondecon al la *Rubik-kubo*. Ŝi plendis ... "*Gundar apenaŭ parolas kun mi antaŭ enlitiĝi, tiom lacigita li estas pro la ludo ... Li eĉ ne kapablas brakumi min !*".

En Connecticut, oni devis prokrasti futbal-matĉon, ĉar unu el la kunludantoj, Bob Blake, ne aperis sur la ludkampon ! Lin oni malkovris en la vestodeponejo de la sport-klubo, "ludanta" kun iu *Rubik-kubo*...

En 1992, okaze de la Konferenco de la eŭropaj estraroj en Edinburg (Britio), *John Majer* uzis la *Rubik-kubon*, por ekspliki la *Maastricht-Konvencion*, praktike por montri ĝian nesolveblan totalecon...

En 1980 formiĝis la memvola organizo „*Cubaholics Anonymous*” por helpi je dekutimiĝo la ludo-"dependeculojn". La organizo estis fondita de *Augustus Judd*, kiu -laŭ sia konfeso- ankaŭ li mem estas "dependeculo".



*Julia Humana*

## Rememoro pri japana bohemisto KEI KURISU

En 2009 forpasis 99-jara elstara japana bohemisto s-ro Kei Kurisu. Li tradukis al japana lingvo multajn verkojn el la ĉeĥa literaturo. Sekva kontribuaĵo celas omaĝi tiun honoran membron de Ĉeĥa-Japana Asocio kaj montri lin kiel modestan kaj laboreman homon.

Petr Chrdle skribis artikolon pri renkontiĝoj kun li en la ĉeĥa lingvo por renomata ĉeĥa periodaĵo Grand Biblio. Ĝin tradukis al Esperanto Jana Čichová.



Kei Kurisu kun Petr Chrdle en 2007

### Unua Renkontiĝo

En jaro 1994 mi prelegis en Japana Esperanto-Instituto pri disfalo de Ĉeĥoslovakio. Dum la prelego mi rimarkis maljunan viron, kiu ne nur tre atente sekvis ĉiun mian vorton, sed enregistradis etajn rimarkojn. Kaj kiam mi finis kaj alvokis al demandoj, li havis absolute konkretajn demandojn je detaloj, el kiuj mi ekkonis, ke li la situacion ĉe ni multe pli precize konas ol la plej multo da ĉeĥoj kaj slovakoj. Post la fino li sin prezentis simple: "Mi estas Kurisu Kei" kaj tiel komenciĝis nia unua konversacio, kiu daŭris iom pli longe. (Rimarko : laŭ la japanaj kutimoj la familia nomo antaŭigas la propran nomon, sed en la artikolo por la ĉeĥa publiko la vicigo estas laŭ la ĉeĥaj kutimoj, krom la citaĵo.)


Mi kompreneble sciis pri s-ro Kurisu kiel elstara japana bohemisto kaj esperantisto, sed neniam mi supozis, ke foje mi havos tiun honoron persone kun li paroli kaj eĉ ke ni fariĝos bonaj amikoj.

Miajn simpatiojn li akiris jam pli frue ol kiam li min alparolis dum aŭskultado de mia prelego. Ĉar mi havis eblecon ekkonadi lin pli proksime, lia modesteco, verve, kun kiu li planis ĉion, kion li ankoraŭ devas verki, travivi, organizi, mia admiro al li fortiĝis pli kaj pli. Tiam mi ekkomprenis, kiom juna povas resti la homoj, eĉ post sia 80-jaraĝo, ĝis kiam li vivas pli multe per siaj planoj por estonteco ol per rememoroj pri la pasinteco.

### La vivo de s-ro Kei Kurisu

Li naskiĝis la 18.7.1910 proksime de OSAKA en familio de provinca kuracisto. Jam ĉe la fino de mezlernejo li estis eminenta en la angla lingvo, krom tio li lernis la francan kaj rusan lingvojn. Li intencis dediĉi sin al la lingvoj profesie, sed pro difekto de parolo pri tio li rezignis kaj strebis fariĝi poeto. Kaj, li laboris en fabriko. Ĉar li suferis je tuberkulozo, li devis kuraci sin en sanatorio, kie li renkontis unu esperantiston kiu vekis en li intereson pri Esperanto. Ĝin li sinsekve tre rapide kaj perfekte ellernis.

Ekde junaĝo Kei Kurisu havis socialan konvinkon kaj plejparte legis proletan literaturon. Li okupiĝis aktive pri proleta kultura agado precipe kiel publicisto kaj redaktoro. Ofte pro tio lin persekutis la sekreta polico TODDO (analogio al germana Gestapo). En la jaroj 1937-39 preskaŭ



du jarojn li pasigis en malliberejo. Tie al lia malsano aldoniĝis eĉ pliaj malsanoj, precipe beribero kaj skabio. Malgraŭ tiuj ĉi malhelpoj li transvivis la militon kaj post ĝi li povis finfine valorigi siajn lingvajn konojn, kaj tiamaniere certigi sian vivtenon komence kiel tradukisto ĉe kontakto de Osaka Elsenda Stacio kun Cenzura oficejo de usona armeo, pli poste eĉ kiel tradukisto de beletra literaturo kiel kultura kaj literatura komentariisto kaj recenzanto.

**"Kion al mi donis ĉeĥa literaturo"**

Kei Kurisu apartenis al konvinkitaj japanaj komunistoj, kio kompreneble influis ankaŭ elekton de tradukataj verkoj. Ilia listo estas longa, kiel li konfesas en sia eseo (Kion al mi donis ĉeĥa literaturo (KAVA-PECH 1996)). La ekkono de rilatoj en ĈSR post la jaro 1948 malfermis liajn okulojn kaj li nuligis sian apartenon al la japana komunista partio. Lin mirigis precipe tio, ke la komunista reĝimo en Ĉeĥio cenzuris ne nur la verkojn de HAŠEK inkluzive la "Brava soldato Ŝvejk", sed ankaŭ sian heroon Julius Fuček. Tiun ĉi malblindiĝon li akiris helpe de Esperanto, kiam li komparadis esperant-lingvajn tradukojn de ĉeĥaj verkoj laŭ originaj eldonaĵoj, kiujn li ricevis de ministerio pri kulturo. Li mem skribis: "Pro mia proleta konvinko mi ellernis Esperanton kaj pere de ĝi kaj de ĉeĥa literaturo mi ekkomprenis, kia estas la reala komunismo."

### Kelke da neforgeseblaj travivaĵoj

Ĉe sia lasta vizito en Prago en 1996 post finiĝo de UK Kei Kurisu estis mia gasto dum unu semajno, tiel ni havis eblecon pli bone ekkoni nin reciproke dum vesperaj diskutoj, kiam ni planis ĉion, kion li volas viziti. Da tio ne estis malmulte. Mi lin akompanis ekzemple al la Ĉeĥa-Japana Asocio. Ĉe la invito en Praga Kastelo (sidejo de la prezidento, rim. De la tradukisto) lin tre ekinteresis la laborejo de s-ro prezidento kun motivoj de tradicia japana pordego torio (ĝi estas pordego antaŭ ŝintoistaj sanktejoj) sur la muro ĉirkaŭ la enirejo rekte vidalvide de prezidenta labortablo. Lin tre ĉagrenis, ke li ne povis persone renkontiĝi kun la prezidento Václav Havel, ĉar tiatempe tiu estis en eksterlando.

Sed kun lia sekretario li tre agrable diskutis.

La plej malbona travivaĵo por ni estis, kiam mi lin lasis iri tra Prago sola, ĉar mi devis ion aranĝi.


En metroo oni ŝtelis lian monujon, sed eĉ tio ne malbonigis lian humoron. Li nur diris: "Tie mi portas nur iom da kronoj por la poŝtelistoj, ke ili estu kontentaj kaj ne serĉu pluen." Kaj li montris al mi, kiel rafinite kuŝas lia mono kaj liaj dokumentoj.

Kiam ni planis, kien veturi ekster Prago, li elektis la monton Říp kaj la Malgrandan Fortikaĵon Terezn. Du lokojn konitajn kun la ĉeĥa historio, kiujn li bedaŭrinde dum siaj antaŭaj vizitoj de Ĉeĥio ne ekkonis. Kiam li poste ekstaris sub Říp leginte la informojn sur la inform-tabulo, mirige li diris: "Ĉu nur tia monteto, mi imagis, ke tio estas montego!". En Terezn-fortikaĵo li tre ŝvitigis la gvidistinon, al kiu li havis multe da demandoj, el kiuj vidiĝis, ke li konas la historion de la fortikaĵo eble pli bone ol ŝi mem. Ofte ja ŝi post lia respondo aŭdis "Sed tiel tio ne povis esti, ĉar. . ." kaj ŝi devis konfirmi, ke s-ro Kurisu pravas.

Mi ne povas neglekti unu travivaĵon ankaŭ tre karakterizan. Kiam nia komuna amiko el Belgio Y. Schram antaŭ 5 jaroj vizitis Kei Kurisu en lia pensiono por senioroj, ili renkontiĝis malsupre en la halo kaj s-ro Kei Kurisu lin invitis iri supren. S-ro Schram aŭtomate direktiĝis al la lifto, sed li aŭdis: "Se mi veturus per lifto, eble mi ĉi tie ne plu estus", "vi iros kun mi sur la ŝtuparo". Do Schram iris piede esperante, ke Kei Kurisu loĝas en unua aŭ dua etaĝo. Malrapide kun paŭzoj li devis malantaŭ la maljunulo supreniri ĝis la sesa!

### La adiaŭo

Lastan fojon ni kun s-ro Kei Kurisu renkontiĝis en la Universala Esperanto-kongreso en Jokohamo en aŭgusto



Dum UK 1996 en Prago

2007. Pro lia aĝo 97 jaroj mi antaŭvidis, ke ni vidas nin la lastan fojon, kio bedaŭrinde realiĝis. Mi strebis egoisme almenaŭ ĉerpi kiel eble plej multe el lia vivo-vervo kaj konservi tiun ĉi lian heredaĵon kiel eble plej longtempe. En sia 97-a jaraĝo li preskaŭ ne vidis, ne aŭdis, tre peze moviĝis, sed lia intereso pri novaĵoj de mia eldonejo kaj pri novaĵoj el Ĉeĥio elpuŝegis mian spiron! Kiel mi finfine povis demandi, kiel li fartas - kaj atendis laŭ ĉi-landaj spertoj elkalkuladon de malsanoj kaj ĝemoj - li min tre surprizis. Li komencis per tio, kion li eklaboris kaj kion li intencas fini, ekzakte en tiu etoso, kion mi ĉe li admiris ekde mia unua renkontiĝo antaŭ 15 jaroj! Unu jaron pli poste ĉesis venadi liaj ret-mesaĝoj kaj finfine mi eksciis, ke la 18.4.2009 li forpasis en sia 99-jaraĝo por ĉiam. Lastfoje li prilaboradis tradukon de HAŠEK "La Historio de Partio de milda progreso en limoj de leĝo", kiun li ne plu sukcesis fini.

Trad. JACI  
Jana Čichová

## La 5-a Internacia Renkontiĝo de Meditado 8-11ajn de aŭgusto 2010 en Koreio

Esperantista Asocio de Ŭonbulismo (prezidanto KIM Sang-ik) ĉiusomere okazigas enhavo-riĉan renkontiĝon kun diversaj programeroj, en kiu oni povas praktiki meditadon, fari komunan ekskurson al vizitindaj lokoj, sperti korean kulturon, ekkoni pri Ŭonbulismo kaj tiel plu.

1. Kiam: de 8a ĝis 11a de aŭgusto 2010 (de dimanĉo al merkredo), tri noktoj kaj 4 tagoj
2. Kie: Trejnejo Bongdo en Seulo, Koreio
3. Enhavo: meditado, meditado-gimnastiko, ko-

- rea kulturo kaj tradicia ludo,
4. Esperanto-prelegoj, ekskurso, amuzaj ludoj, bankedo kaj tiel plu
5. Kotizo: 30 eŭroj aŭ 50.000 Ŭonoj (programo, manĝado, loĝado, ekskurso, bankedo)
6. Nombro: 20 personoj el ekster Koreio kaj 20 el Koreio
7. Oficiala lingvo: Esperanto
8. Aliĝlimdato: kiel eble plej frue

### B.v. sendi ĉi-tiun aliĝilon al LEE Jung-kee (esperanto@saluton.net)

Nomo : S-ino S-ro

Profesio

Adreso

Mi prelegos

Jes

Ne

Restado-tempo en Koreio

Retadreso

# ni provu rideti!...

... pri "oleo-renovigo" ( aŭtomobilo ) ...

## uzmodo por virino


- 1 - rendezuo ĉe la kutima garaĝo
- 2 - dum la evento, trinki kafon
- 3 - post dudek minutoj, subskribi ĉekon, forlasi la garaĝon ĉe stirilo de "nova" veturilo. Rehejmiĝi.

elspezoj oleo kaj manlaboro 45 €  
 kafo 1 €  
 sume 46 €

## uzmodo por viro

- 1 - vizito de fak-butiko por aĉeti oleon, filtron kaj senodorigilon ( alkroĉenda parfum -saketo ). Rehejmiĝi.
- 2 - trinki bieron ...
- 3 - surmeti uzitan vestaĵon, eniri la propran garaĝon, surgenuiĝi, rampi sub la veturilon por -esplortuŝante- malkovri adekvatan lokon, cele lokigon de la kvar stabiloj, sur kiuj ripozos la veturilo.
- 4 - bieron ...
- 5 - nova surgenuiĝo, puŝo de kuveto sub la motoron ... "horizontaliĝi", rampi, malŝraŭbi la specifan ŝtopilon, kiu neoportune falas en la kuveton kuni la unua oleo-elfluaĵo.
- 6 - sakri, "vertikaliĝi". Bieron ...
- 7 - suprenlevi la kapoton, malkovri kie kuŝas la filtro, forigi ĝin -malfacile- dolorigi fingron ... Sakri.
- 8 - Surprizo... jen alveno de kompano ! ... "Hem, mi ne volas ĝeni ! ... Ne gravas kamarado, morgaŭ denove sunumos i".
- 9 - Bieron... Ne, du bierojn ... "Je nia sano i" ...
- 10 - Foriras la amiko... Nu, tempo ankoraŭ disponeblas.
- 11 - Surgenuiĝo, altiro de la plena kuveto. Iri ĝis la fundo de la ĝardeno, kie atendas truo hieraŭ fosita, elverŝi enen la malpuran oleon ...
- 12 - Bieron ... Neeblas i ... lastaj boteloj trinkitaj kun la kompano !
- 13 - piedumi ĝis la najbara magazeno, aĉeti botelpakon.
- 14 - rehejmiĝi... Bieron i ...
- 15 - verŝi freŝan oleon en la adekvatan lokon ... Subite rimarki, ke oleo-makulo grandiĝas sur la grundo ! Sakri... kaj memori, ke la faka ŝtopilo certe kuŝas en la ĝarden-truo !
- 16 - bieron ... Reiro en la ĝardenon, nova fosaĵo, malkovro de la ŝtopilo, purigo de la objekto ...
- 17 - bieron ...
- 18 - denove horizontaliĝi, alŝraŭbi la ŝtopilon.
- 19 - vertikaliĝi, verŝi la novan oleon en la oleo-ujon.
- 20 - forigi la kvar stabilojn ... Unu rompiĝas dume ! Sakri.
- 21 - bieron ...
- 22 - sidiĝi ĉe la stirilo, forlasi la garaĝon, eniri la unan strat-ĝirejon sed veturi maldekstren !
- 23 - malbonsancon ... Jen policisto ! "Vetur-legitimilon mi petas ! Jen etilometro... Blovu ... Aj ! Eliru mi petas ... Donu al mi la aŭto-ŝlosilon !.."
- 24 - poŝ-telefono ... alveno de fak-kamioneto ...
- 25 - rehejmiĝo piede ...
- 26 - bieron ... Ne ! ... Freŝan akvon !

elspezoj oleo, filtro, sennodorigilo 52 €  
 biero 20 €  
 monpuno pro ebrieco 900 €  
 remorkado de la veturilo  
 ĝis la aŭto-gardejo 130 €  
 pago de la "gardej-garaĝo" 100 €  
 sume 1202 €



Dum ordigado de diversaj paperaĵoj, Johano kaj lia edzino malkovras kuponon de ŝu-riparisto, ricevita antaŭ dek jaroj !

Ridetante, ili scivole vizitas la butikon de la ulo, ne plu memorante al kiu el la du apartenis la ŝuparo... kaj kio okazis pri ĝi post jardeko !

La fakisto okulumis al la slipo, malaperis en la najbaran ĉambron kaj revenis, tenante en la manoj du ŝuojn de virino kun difektitaj kalkanumoj ...

" Senkaŭpigu min, revenu jaŭdon, ili estos pretaj... Sed mi konfesas, ke mi estis superŝuita je laboro lastatempe !".



Iu turisto, kiu tute perdiĝas en dezerto ekvidas beduenon sur la sojlo de eta butiko...

"Helpon, helpon mi petas, mi soifegas, ĉu eblas ricevi iom da akvo ?

- Mi vere bedaŭras, sed mi vendas nur kravatojn ...".

Pluraj beduenoj poste trafitaj ne kapablas donaci iun akvo-guton ...

Miraklo ! Ĉe la horizonto aperas granda hotelo en oazo.

" Helpon, helpon ! Rapidu ... mi estas tute dehidratigita ! - Bedaŭras mi, estimata sinjoro, sed vi ne rajtas eniri en la hotelon, se vi ne surhavas kravaton ! ".



# distra angulo



## 1 – distra angulo

1	+ - - + -	ekstera membrano
2	+ - - +	meritanta ion
3	+ - - + -	rakonta poezio
4	+ - - + -	aro el 500 paperfolioj
5	+ - - + - -	plena je vikleco kaj energio
6	+ - - + - -	organo de Unuiĝintaj Nacioj
7	+ - - + - - -	haŭta afekcio
8	+ - - + - -	forte punanta
9	+ - - + -	kapvesto de la papo
10	+ - - +	parto de cirklo
11	+ - - + - - -	kalva
12	+ - - + - - - -	Helena verkisto
13	+ - - + -	floro kun rizomo
14	+ - - + -	primat-mamulo
15	+ - - + - -	juvelŝtono
16	+ - - + - -	pli granda ol 90°
17	+ - - + - -	denove diri ion jam dirita
18	+ - - + -	parto de la okulglobo
19	+ - - +	inverse : alta konstruaĵo
20	+ - - + - -	optika fenomeno
21	+ - - + - - -	marsupiulo
22	+ - - + -	ĉirkaŭa parto de surfaco
23	+ - - +	serio de notoj
24	+ - - + - -	artropodo
25	+ - - + - -	kroata batalanto
26	+ - - + - - - -	centro de tertremo
27	+ - - +	stangeto pafita per arko

Helpe de la ĉi-subaj vorteroj, alfabete ordigitaj, malkaŝu la kaŝitajn vortojn.

La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legitaj, elvokas ian tempo-difinon.

an ar ar ar cen da do do do eo epi epo eri es ga go  
 ĝo ha ha he in ir iro iso ko ko mi mio mo mo ob op  
 or os pa pe ra ra ra ran ri ri ro ro sa se sen si smo  
 so ŝo ta te ti ti tia to to tro tŭ umo un us ut uto va  
 ve za za zo


**Solve de la lasta "vertikala enigmo" ( 149 )**

*Al kio utilis inteligenteco, se stulteco ne ekzistus?*

- Usona ŝtato. Ornama, brodita tru' en tuko. Tragedio de Shakespeare. Indonezia insulo. Havanta nenian valoron.
- Plata vaz' en kiu oni manĝas. Regnokodo de Pollando. Provizi per subtenantaj traboj en minoj. Preciza loĝloko de iu persono. Leda strio kiu ĉirkaŭas la talion.
- Sonfiguro, konsistanta en la imitado de naturaj bruoj. Genro de polpo. Dumasta velsipo.

Dankon al nia samideano Joël GRANDJEAN, kiu verkis la supran krucvortenigmon




## 2 - krucvortenigmo



1 Esenca frazelemento – 2 Klarig' pri manĝaĵa preparado. Prepozicio – 3 Situacio de merkato kun limigita nombro de vendistoj – 4 Prefikso. Prepozicio signifanta "Ni komencu!". Ruĝa part' de kelkaj heteroproteinoj – 5 INVERSE: Movu en akvon. Tia, ke ĝi movas al si – 6 Regno en okcidenta Afriko – 7 Troa produktado de salivo. Nomo de litero – 8 Komunaj monunuoj. Alta mont' kun paŝtejoj – 9 Manĝaj' farita el sekaj semoj – 10 INVERSE: Malestiminda. Perceta organo – 11 Numeralo. Numeralo – 12 Okulkavo. Nomo de litero – 13 INVERSE: Posesivo. Son' farita dum dormado – 14 Inflam' de vira glando – 15 Artikolo. Blugriza petro – 16 Nelonga verk'. Labi' – 17 Vasta aro de domoj kaj stratoj. Nomo de litero – 18 Kampar'. Prefikso. Sufikso esprimanta agon – 19 Latuna blovinstrumento – 20 Nervo (en kummetaĵo). Sufikso esprimanta kolekton – 21 Lok' kie oni purigas tolaĵojn – 22 Zorgos por atingi ion – 23 Arbo ofte uzata en heĝo. Siberia river' – 24 Partikulo por emfazivorton. Ĉina monunu' – 25 Partikulo uzata kun pli aŭ malpli. Miraĝ' – 26 Specialist' pri birdoj – 27 INVERSE: Patrino. Duvizaĝa romana dio

## VERTIKALE

- Abismo. Familioj de fiŝoj, kiel limandoj.
- Sistem' de ideoj bazita sur le kredo je Dio. Emi'. Malofta. Ruĝoranĝe. Urbo de Svislando.
- Sporpokal'. Timo esti en publikaj lokoj. Drinkintaj homoj. INVERSE: Tenil' de korbo.
- Perdoj de la originalaj kvalitoj de sia speco. Urbo de Kongo. Delikataj ŝtofoj el lano. Insekt' boranta galeriojn sub la arbŝelo.
- INVERSE: Ag' reprodukti tekston. Germana rivero. Partikulo. Klarigo de la senco de nova vorto. INVERSE: Korelativo.
- MONOGRAMO: Fama grupo de muzikistoj. Korelativo. Ago de persono, kiu ludas rolon. Denove. Agoj de perfekteco.



1 – Kimie kaj Cyril en Obernai 2 – JoMo dum la distra vespero en Villers 3 – Grupo da "staĝanoj" en Villers 4 – Multaj kongresanoj (Kaiserslautern) tranoktis en la hotelo "Alcatraz"... malnova malliberejo de la urbo ! Daŭre videblas la alta muro, kun pikdrato !!! 5 – Okulfrapa japana ĝardeno najbaras la hotelon